

Januaro 1971
64-a jaro
n-ro 782 (1)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



KONGRESI
SUR LA
LUNO?

Vi trovos

ion por preskaŭ ĉiu gusto en nia jarkomenca numero de Esperanto. Ne nur novan jaron, sed novan jardekon inaŭguras nia prezidanto per la apuda ĉefartikolo mediotplena. Nian rigardon al la estonteco kaj okupiĝon pri mondaj problemoj ekster la Esperanto-movado simbolas ankaŭ la kovrila bildo kaj la artikoloj sur la postaj paĝoj, i.a. pri la projekto de UN-universitatoj. Tiuj, kies gustoj ne ampleksas la studadon de naciaj lingvoj, bonvolu indulgi la artikolon pri la latva lingvo (p. 5-7), ĉar por multaj legantoj la ekkono de aliaj lingvoj kaj fremdaj pensmanieroj helpas atingi mondan konceptadon kaj uzadi la Internacian Lingvon libere, sen troa influo de la gepatra lingvo-stilo. Indulgon ni petas ankaŭ pro la kelkaj teknikaj malperfektaĵoj, kiuj makulis la lastajn numerojn de la revuo, kaj kiuj estas neeviteblaj dum la lernado pri nova grafika sistemo. Fine, ni tre dankas pro la ĉiam pli multaj leteroj de legantoj, kiuj atingas la Oficejon. Eĉ kiam ili estas mallaŭdaj, ili pravas al ni, ke la revuo estas atente legata ĉie en la mondo.

Enhavo

- 1 Fronti la realaĵon per sciencaj metodoj — Sur la sojlo de la oka jardeko (Lapenna)
- 2 Ĉu Esperanto-kanzonoj aŭdiĝos per "Intervizio" en la orienta Eŭropo?
- 2 Norvega Ŝtata Fervojo pretigis esperantlingvan filmon
- 2 Mondkonceptaj U.N.-universitatoj
- 3 Literatura traduk-centro bezonata en Azio
- 4 La prezidanto de UEA reprezentis la Asocion en gravaj kongresoj
- 5 La latva lingvo (Jaunvalks)
- 6 Sendormemo (Rossi)
- 8 Por pli efika informado
- 9 Recenzoj
- 10 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 12 Leteroj de legantoj
- 12 Malfacilaĵoj ĉe monda konferenco en Nairobi (citaĵo)
- 14 TEJO kongresos en Skotlando (TEJO-paĝo)
- 14 56-a Universala Kongreso, Londono, 1971
- 16 Esperanto en radio
- 16 Jam "unueca" Eŭropo? (citaĵo)
- 17 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
- 18 Oficiala informilo, n-ro 441
- 18 Impostoj pri heredaĵoj (Woessink)
- 20 Anoncetoj

La kovrilo

La preparlaboroj por la Universala Kongreso en Portland, Oregon, en 1972 jam intensiĝas. Konstanta Kongresa Sekretario Mikuláš Nevan partoprenis seminarion en Amsterdam pri turismo al Usono kaj tie renkontis astronauton John Young (partopreninton de flugoj Gemini kaj Apollo 11-a) apud la ekspoziciita specimeno de luna roko.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktoro: f-ino A. Nagata

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por aerpoŝto aldonu: Aŭlio kaj N-Z. 13,75 gld. jare; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Us., Meks. 5,50; Isr. 2,75 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. = 285 gld., ½ p. = 150 gld.; ¼ p. = 85 gld.; 1/8 p. = 50 gld.; 1/16 p. = 35 gld. Kliŝkostoj ekstere. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Grafisch Bedrijf Tuijtel, Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 87 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.G.

Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: U.J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, F.R. Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris 17e, Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: J. Uśpieński, Poŝtkesto 100, Warszawa-12, Polujo.

Estrarano pri financoj kaj administrado: E.J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

FRONTI LA REALAĴON PER SCIENCAJ METODOJ

Sur la sojlo de la oka jardeko

En la socio, same kiel en la naturo, ĉio moviĝas. Senĉese io malaperas kaj samtempe io nova kreiĝas. Senlima interligiteco kaj reciproka influado regas la fenomenojn. Jeso kaj neo, pluso kaj minuso, ago kaj reago, unuvorte pozitivo kaj negativo estas esencaj proprecoj de la evoluprocezoj. Pro kvantaj kreskoj ŝanĝiĝas kvalitoj. Kaŭzo kaj sekvo interplektiĝas. Ĉiu sekvo estas kaŭzita de io, sed samtempe ĝi mem entenas la kaŭzon de plia sekvo. Tezo kaj antitezo kuniĝas en sintezo, kiu siavice prezentiĝas kiel nova tezo, elvokanta sian propran antitezon kaj kondukanta al nova sintezo sur pli alta ŝtupo. Kaj tiel plu en la senfinon.

Tiuj ĉi bazaj principoj ne estas elpensitaj de la homo. Ili troviĝas en la aferoj mem. Komprenataj korekte kaj profunde, ili fariĝas metodo de pensado, kaj en tiu senco ili estas solida elirpunkto por studado kaj de la naturo kaj de la socio. Per tio, tamen, ilia komuna rolo finiĝas, ĉar la leĝoj de la naturo kaj tiuj funkciaj en la socio tute malsamas. Tial aplikado de la leĝoj de la naturo al la socio, aŭ biologiigo de sociaj fenomenoj, eĉ nur metafore, estas kontraŭscienca kaj necese kondukas al eraraj konkludoj. Ekzemple, identigo de socia strukturo kaj homa organismo (laŭ la konata elementlerneja skemo: cerbo, manoj, stomako), aŭ, por resti sur nia tereno, komparado de lingvo kun ĉevalo ("naturaj" lingvoj) kaj aŭtomobilo ("artefarita" lingvo) estas ne nur science malĝusta, sed ankaŭ danĝere misgvida.

Fundamenta distingo

La fundamenta kaŭzo de malsameco inter la naturaj kaj sociaj branĉoj de la scienco ŝuldiĝas al la malsameco de la du grandaj objektoj, al kiuj ili rilatas: naturo kaj socio. Sur la kampo de naturaj sciencoj oni ekzamenas la objektivan eksteran mondon, la materion mem, kaj eksperimentoj helpas la konfirmon de konkludoj; en la sfero de sociaj sciencoj la esploroj koncernas homajn kolektivajn kiel tiajn, la aspektojn de kunvivado interne de ilia sino, la rolon de historio kaj tradicioj, la influon de la ĉirkaŭaĵo kaj multajn aliajn faktorojn, kaj eksperimentado aŭ tute forestas aŭ apenaŭ eblas. Aldone, socia sciencisto, eĉ se li konscie klopodas distanciĝi, restas integra ero de la objekto mem de sia esploro, kio almenaŭ iugrade efikas subjektivisme je liaj konkludoj.

Tial la antaŭvideblo en la naturaj sciencoj kutime estas ekzakta, en ĉiu okazo multe pli granda ol ĝi estas en la sociaj. Se oni konas la komponantojn, oni scias kun absoluta precizeco la rezultanton. Neniu branĉo de sociaj sciencoj kapablas liveri tiajn ekzaktajn antaŭvidojn, sed tio neniel signifas, ke ili ne po-

sedas sciencajn metodojn, kiuj ebligas establi evolu-tendencojn kaj antaŭvidi la ĝeneralajn sekvojn, al kiuj ili kondukas. Kvankam sociologio, ekonomiko, historio, juro kaj aliaj fakoj de la socia sciencobranĉo necese postrestas malantaŭ la atingoj de la naturscienco, tamen ankaŭ ili multe progresis kaj atingis plurajn rimarkindajn rezultojn.

Apliki sciencajn metodojn al la lingvo antaŭ ĉio signifas trakti ĝin kiel apartan instrumenton de interhoma komunikado, regatan de sociaj leĝoj, kaj liberiĝi de ĉia ajn "naturisma" fetiĉo. Jam tiu baza aliro ebligas korekte taksi la pozicion de Esperanto en la lingva mondo. Por kompreni ĝiajn ekestojn, evoluon, nunan situacion kaj perspektivojn por la estonteco, necesas, krome, rigardi ĝin en la kadro de la tuta lingvoproblemo laŭ ĉiuj ĝiaj ĉefaj aspektoj: lingvistika, ekonomika, politika, sociologia, psikologia kaj jura. Precize tion faras CED laŭ siaj eblecoj. Ĝiaj dokumentoj, aŭ la studoj kaj artikoloj publikigataj en la periodaĵo "La Monda Lingvo-Problemo" estas je dispono de ĉiuj seriozaj studentoj.

Magiaj bastonetoj

En la lastaj jaroj aŭdiĝis pesimismaj voĉoj pri la kva-zaŭa stagnado aŭ eĉ pri regresoj de Esperanto. Fakte, pli korekte estus paroli pri nekontentiga progresado, ĉar ja Esperanto daŭre disvastiĝas, sed ne tiel rapide, kiel ni ĉiuj dezirus. Nu, senkonsidere al la nuncoj de la uzitaj terminoj, la fakto estas, ke la pesimistoj fariĝis senpaciencaj kaj eĉ iom nervozaj. Rezulte, sen multe da kompreno pri la komplekseco de la lingva problemoj kaj la kunligiteco de ĝiaj multnombraj eksteraj kaj internaj elementoj, oni haste lanĉis iajn miraklajn receptojn por venkigo de Esperanto en kelkaj jaroj; oni saltis de unu ekstremo, ekzemple, nur idea signifo de la lingvo, al alia, nome pure praktika rolo, anstataŭ korekte taksi ambaŭ; oni ekdiskutis ĉu agi ĉe internaciaj aŭ ĉe landaj instancoj aŭ rekte ĉe la amasoj, kvankam la ĝusta formulo ne estas "aŭ...aŭ", sed "kaj...kaj"; unuopuloj, verŝajne fidante, ke ili posedas iajn magiajn bastonetojn superantajn la kolektivan saĝon kaj la akumulitajn spertojn de niaj organizaĵoj, en kelkaj kazoj frapis per ili, sen interkonsiliĝo kun iu ajn, sur la pordojn de gravaj internaciaj aŭ landaj instancoj kaj, kompreneble, ne nur ne atingis ion ajn, sed eĉ kompromitis la seriozecon de la afero, al kiu ili deziris helpi.

Kiel oni povis antaŭvidi kaj kiel nun ĉiuj scias, okazis nenia spektakla venko, sed la senbaza pesimismo kaj ĝiaj negativaj manifestiĝoj ja kaŭzis malbonon: ĝi infektis plurajn kaj en kelkaj niaj medioj eĉ kaŭzis apation. Aliflanke, denove tute antaŭvideble, venis ankaŭ pozitiva reago en formo de freŝa optimismo, firme bazita sur atenta konsidero de la objektivaj kondiĉoj, kaj tial ankaŭ kompreno, ke, sume, la pozitivaj faktoroj prezentiĝas kiel pli fortaj, ol la negativaj, kio garantias la pluan normalan progresadon de la lingvo.

Sur la sojlo de la oka jardeko de tiu ĉi scienca jarcento ni esperu, ke ĉiam pli vastiĝos ekzamenado de la Internacia Lingvo kaj de ĝiaj nuna kaj potenciala roloj en la mondo laŭ sciencaj metodoj.

Ivo Lapenna

Ĉu Esperanto- kanzonoj aŭdiĝos per "Inter- vizio" en la orienta Eŭropo?

Ekestis interesiĝo pri la internacia elsendo de Esperanto-kanzonoj flanke de la Bulgara Televido, kondiĉe ke tia programo plaĉos al la spektantoj.

Inter la orienteŭropaj landoj, Pollando, G.D.R., Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Rumanujo kaj Sovet-Unio, ekzistas interŝtata televida organizaĵo *Intervizio*, dum por la okcidenteŭropaj landoj estas *Eŭrovizio*.

Se multe da spektantoj el la orienteŭropaj landoj petos de la Bulgara Televido (adreso: Todor Strašimirov 2, Sofia) dissendon de Esperanto-kanzonoj fare de bulgaraj kantistoj (i.a. Margret Nikolova, Mimi Nikolova, E. Dimitrov, K. Semov kaj Miŝo Zdravev), la televidostacio povos efektiviĝi tiajn programojn pere de *Intervizio*, laŭ informoj de oficulo de la Televido. Ankaŭ en ĉi tiu kazo la enkonduko de Esperanto en la televidon dependas de ni mem.

La rimarkinde kreskinta eldonado de esperantlingvaj popularaj kanzonoj sur diskoj en la lastaj kelkaj jaroj montras, ke troviĝas jam sufiĉa repertuaro. La plej novaj diskoj de tiu speco estas la longedaŭra brazila (vidu p. 17) kaj la dua disko de Miŝo Zdravev.

Norvega Ŝtata Fervojo pretigis esperantlingvan filmon

Spertinte la grandan intereson vekitan de siaj turismaj broŝuroj en Esperanto, la Norvega Ŝtata Fervojo nun pretigis ankaŭ Esperanto-version de sia turisma filmo pri vojaĝo en suda Norvegujo, sub la titolo "Mi estis tie". Ĝi estas 16-milimetra kolorfilmo, kiu daŭras 20 minutojn. Laŭ la vortoj de Norvega Esperantista Ligo, "la filmo estas tre bela kaj eĉ amuza; cetere la Esperanta parolo estas tre klara". Esperanto-organizaĵoj laŭvice povas pruntepreni ĝin kontraŭ du internaciaj respondkuponoj, skribante al la Ligo, Boks 942, Oslo 1. Ĝi estas tute alia filmo, ol tiu de la sama Ŝtata Fervojo, kiu prezentiĝis en Vieno dum la 55-a UK.

MONDKONCEPTAJ

Ĉu la famajn malnovajn universitatojn de nia mondo, kiuj allogas studentojn el ĉiuj kontinentoj pro sia alta reputacio, iam anstataŭos novaj internaciaj centroj sub aŭspicio de Unuiĝintaj Nacioj? Ne anstataŭi sed kompletigi estas la celo de projekto nuntempe multe diskutata. Ĝi antaŭvidas la starigon de novaj internaciaj universitatoj, kiuj edukus siajn anojn en spirito vere monda, sen troa influo de la gastiganta lando. Sed ĉu tia monda edukado iel eblas sen la uzo de monda lingvo? En ĉi tiu artikolo ni klarigas la bazon de la projekto kaj avertas pri grava lingva problemo, kiun devas fronti tiuspeca universitato de U.N.

Persatelitaj lecionoj planataj

Naskiĝis ĉe Unesko pli moderna ideo, nome pri UN-universitatoj ligitaj unuj kun la aliaj per televido tra satelitoj. Tiu plano celas: 1) fondi UN-universitatojn en pluraj lokoj en la mondo kaj instali ĉe ili aparatojn por telekomunikado, 2) okazigi komunajn lecionojn samtempe en la diversloke situantaj UN-universitatoj, kaj krome 3) havigi al ĉiu UN-universitato apartan karakteron konforman al ĝiaj geografiaj kondiĉoj.

Ĉu uzi la jam ekzistantan satelitsistemon "Intelsat" aŭ lanĉi novajn satelitojn de UN mem, oni ankoraŭ ne konkrete diskutis.

Kie konstrui UN-universitatojn? Pro ekonomia kialo estos malfacile fondi plurajn universitatojn samtempe. Cetere, en kiuj ajn landoj fondos ilin UN, estos lingvaj malfacilaĵoj, ĉar la studentoj kaj profesoroj estos diversnaciaj.

Lerno el eksperimento

Antaŭ kelkaj jaroj okazis eksperimenta samtempa televid-dissendo interkontinenta, kion verŝajne la plejparto de la legantoj bone memoras. Ĝi okazis surbaze de kunlaboro inter dekoj da televidstacioj tra la mondo. Ĉiu stacio uzis por tiu dissendo principe la nacian lingvon de sia lando, kaj tiun interpretis en la anglan la londona stacio, funkciante kiel la centro de tiu eksperimenta reto. El la angla lingvo ĉiu stacio interpretis en sian nacian lingvon. Okazis interalie, ke la londona stacio interpretis el arablingva parolado de la stacio en Tuniso nur la nomon de la parolanto — kaj neniom pli. Sekve, almenaŭ en Japanujo kaj verŝajne en ĉiuj aliaj landoj ne-arabaj, la tuta parolado en Tuniso estis vane dissendita nur arabe.

U.N.-UNIVERSITATOJ



La ideo krei universitatojn de Unuiĝintaj Nacioj, lanĉita en septembro 1969 de U Thant, ĝenerala sekretario de UN, iom post iom konkretiĝas, kvankam ankoraŭ en la stadio de surpapera planado komencita en 1970.

Eduki homojn mondkoncepte

Estas kompreneble, ke la Sekretariato de UN deziras havi por siaj oficejoj, suborganoj kaj institutoj homojn, kiuj estas internaciece edukitaj kaj havas mondskalan vidkampon, kaj kies kompetentecoj estas unuarangaj en la mondo. La ideo de U Thant estas: redukti tiajn homojn per la manoj de UN aŭ Unesko, ne nur por UN, sed ankaŭ por la ĝenerala bono de la mondo. Se tiaj universitatoj efektiviĝos, eblos tute novstilaj edukado kaj esplorkomunikaĵoj kun trafa problemkonscio, ne dependaj de la profitoj por unuopaj ŝtatoj.

Laŭ la ĝisnuna plano, la celo de la UN-universitatoj estas "akceli la internaciajn pacon kaj evoluon", kio estas menciita en la Ĉarto de UN, kaj la kursoj kondukos ĝis magistra nivelo. Ĉar ne estas eble solvi en la kadroj de unuopaj ŝtatoj la mondskalajn problemojn (ekz-e veneniĝo de la naturo, la rapida kresko de la homara nombro, utiligo de la oceanoj, helpo al la evoluantaj landoj, naturkatastrofoj) estas esperige, ke la plej bonaj cerboj kolektiĝintaj el diversaj landoj pritraktos tiajn problemojn en larĝa vidkampo, kio estas nun rigardata kiel la ĉefa rolo de la UN-universitatoj.

Pri tiu ideo tuj konsentis kunlaboreme Aŭstrujo, Hindujo, Japanujo, Svedujo kaj Svislando; interalie, Japanujo jam proponis terenon por situejo de UN-universitato. Ĝi samtempe atentigis pri la antaŭvideblaj

lingvaj malfacilaĵoj de la universitatoj el diversaj landoj. Negativaj aŭ pasivaj estas Britujo, Nederlando kaj aliaj kelkaj eŭropaj landoj, kiuj jam havas universitatojn kun internacia karaktero kaj opinias, ke UN ne elspezu monon por tia plano.

Oni ankoraŭ ne scias, en kiuj lingvoj la profesoroj de UN-universitatoj donos lekciojn kaj en kiuj lingvoj la studentoj studos, estante ja diversnaciaj. Kvankam subteninda, la ideo pri UN-universitatoj entenas sufiĉe konkretan problemon... lingvan.

Tamen, antaŭ ol rekomendi la alprenon de Esperanto en tia kazo, ni demandu nin: Se tiuj universitatoj nun tuj komencus uzi Esperanton (kio ne estas antaŭvidebla), ĉu la bazo niaflanka estus jam sufiĉe fekunda? Ĉu ne mankas sciencaj libroj en Esperanto? Dum belliteraturaj verkoj troviĝas jam en diversaj branĉoj de la literaturo, ĉu ankaŭ la scienca kaj teknika literaturo estas tiel ampleksaj, ke oni nun povus elekti kelkajn lernolibrojn?

Sen alfronti tiajn problemojn realece, nek UN nek ni mem povos prezenti konvinke praktikan proponon.

Literatura traduk-centro bezonata en Azio

La 3-a Konferenco de Aziaj Verkistoj, okazinta en Tajbej (Tajvano) de la 16-a ĝis la 19-a de junio 1970, rezoluciis establi tradukcentron por disvastigo de literaturaj verkoj fare de aziaj verkistoj.

En tiu Konferenco ĉeestis 150 personoj el 18 landoj. Ĉeestante kiel gasto, s-ro D. Carver, ĝenerala sekretario de la Monda Asocio de Verkistoj, akcentis en sia parolado, ke estas grave traduki literaturon malpli konatan en lingvon monde uzatan.

La rezolucio estis farita laŭ sugesto de d-ro Lin Yutang, prezidanto de la Konferenco, ke ĉiu azia lando **elektu tri-kvar reprezentantojn kaj sendu ilin al aliaj landoj en Azio por tradukado kaj disvastigo.** Li aldonis, ke tiuj verkoj, kiam ili estos tradukitaj en diversajn aziajn lingvojn, akcelos reciprokan komprenon.


Inter la tradukistoj, kiuj raportis pri siaj spertoj, estis usona verkisto Edward Seidensticker, kiu tradukis preskaŭ ĉiujn verkojn de Jasunari Kaŭabata, japana Nobel-premiito. Li diris, ke tradukado ne estas facila precipe en la kampo de literaturo kaj ke ne malmultaj vortoj kaj esprimoj en iu lingvo estas netradukeblaj en alian lingvon.

La prezidanto de UEA reprezentis la Asocion en gravaj kongresoj

Prof. d-ro I. Lapenna ĉeestis en la lastaj monatoj plurajn kongresojn kaj renkontiĝojn, en kiuj li reprezentis la Asocion.

En la pasinta majo li estis honora gasto de la Sveda Esperanto-Kongreso en Jönköping, kie li prelegis pri "Esperanto kiel la Sola Racia Solvo de la Lingva Problemo". La prelego poste aperis en sveda traduko en la revuo "La Espero". En alia prelego la prezidanto prezentis la rolon de UEA en la moderna mondo.

Parolas profesoro Lapenna . . . ĉi-foje dum adiaŭa akcepto ĉe la prezidanto de la urbo Gyula (Hungarujo), okaze de la solena fermo de la oka Somera Esperanto-Universitato de tiu urbo. Dekstre sur la foto: d-ro J. Mátéffy, la prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio.



En Hungarujo

Laŭ la invito de la Instituto por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando kaj de Hungara Esperanto-Asocio, prof. Lapenna vizitis Hungarujon en julio. Li prelegis en la Somera Universitato de Gyula pri la taskoj de la Esperanto-Movado en la aktualaj cirkonstancoj. Konversacioj kun la reprezentantoj de la lokaj kaj regionaj aŭtoritatoj en la ĉesto de prof. I. Kádár, vizito kun d-ro J. Mátéffy, la prezidanto de HEA, al la kortumo, longa intervjuo en la ĉefa gazeto sendube helpis al fortikigo de la pozicioj de Esperanto en tiu parto de la lando. En Budapeŝto la prezidanto de UEA prelegis en plenŝtopita salonego de la Fervojista Klubo pri la lingva situacio en UN, Unesko kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj. Li havis plurajn gravajn interparojn

lojn kun la oficialaj reprezentantoj de la Instituto por la Kulturaj Rilatoj, Landa Sindikata Centro, Ministerio de Klerigo, kiel ankaŭ kun la Vicministro de Justico. Dum ĉiuj-ĉi konversacioj ĉeestis ankaŭ s-ro B. Berceli, la ĉefsekretario de HEA, aŭ d-ro L. Márton, prokuroro kaj redaktoro de Internacia Jura Revuo, aŭ aliaj funkciuloj de HEA.

Kunlaboro en SAT-kongreso 1970

Tuj post Hungarujo kaj senpere antaŭ la Universala Kongreso, prof. Lapenna ĉeestis la kongreson de SAT en Augsburg, kiun partoprenis ĉ. 400 personoj el 21 landoj. Por la unua fojo en la historio de la du organizaĵoj la prezidanto de UEA salutis kongreson de SAT, kio estis akceptita kun multe da simpatio de ĉiuj kongresanoj. En la inaŭgura solenaĵo prof. Lapenna interalie diris: "Ni ĉiuj havas niajn proprajn filozofiajn, politikajn kaj aliajn konceptojn pri la mondo; ni ankaŭ havas niajn proprajn ideojn pri la rolo kaj signifo de la Internacia Lingvo, sed estas tute certe, ke ni ĉiuj havas la saman komunan idealon: ke la Internacia Lingvo vivu kaj progresu en la tuta mondo." Tiuj vortoj ricevis fortegan aplaŭdon, kio montras, ke la membraro de ambaŭ organizaĵoj ĉiam pretas apogi komunajn agadojn por progresigi la Internacian Lingvon. Dum la kongreso la prezidanto de UEA prelegis en plenplena salonego pri "Aspektoj de Lingva Diskriminacio".

Okaze de la itala kongreso

Prof. Lapenna estis gasto de la brila 41-a Itala Kongreso de Esperanto sur la ŝipo "Caribia" de la 19-26 de septembro. Pri ĝi oni legis en la novembra numero aŭ legos aliloke impresojn kaj kelkajn detalojn. Li faris mallongan paroladon en la inaŭgura solenaĵo en Ĝenovo kaj alportis al la kongreso la bondezirojn kaj salutojn de UEA. Sur la ŝipo li faris prelegon pri "La Internacia Lingvo antaŭ Internaciaj Instancoj", aparte pri la eventoj en Parizo (1952) kaj Montevideo (1954), kun aŭdigo de sonbendo pri la lasta kunsido de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, dum kiu estis akceptita la konata rezolucio de la 10-a de decembro. La prelego elvokis grandan interesiĝon kaj estis aŭskultata kun streĉa atento.

Prof. Lapenna parolis ankaŭ en Barcelono antaŭ la tuta kongreso, ĉ. 200 esperantistoj el tiu urbo kaj granda nombro da aliaj personoj. Intervjuoj kaj gazetaj konferencoj — kun partopreno ankaŭ de la gvidantoj de la Itala Esperanto-Federacio kaj de s-ro Wensing — okazis en Ĝenovo, Barcelono, Tuniso, Palermo, kiel ankaŭ en la itala radio-televido kaj en radio en Andoro.

En pluraj okazoj — de Jönköping ĝis "Caribia" — diversaj personoj, ofte anonimaj, tuj post la paroladoj aŭ prelegoj faris donacojn por la Fondaĵo Hodler, LMLP kaj aliaj celoj.

LA LATVA LINGVO

ED. JAUNVALKS

La baltaj popoloj estis ĉiam tre aktiva parto de la Esperanto-movado. Sed kia gento ili estas? Kaj kiajn lingvojn oni tie parolas, en la ekstrema nord-oriento de Eŭropo. La aŭtoro de ĉi tiu artikolo estas mem baltano kaj parolanto de la latva lingvo.

La latva lingvo kune kun la litova kaj jam en la fino de 17-a jarcento formortinta idiomo de antikvaj prusoj apartenas al la grupo de baltaj lingvoj, kiuj siavice estas branĉo de la hindoeŭropa lingvofamilio. La latvan lingvon hodiaŭ parolas pli ol 1 300 000 da latvoj, loĝantaj en la Latvia Soveta Socialisma Respubliko kaj proksimume 150 000 latvoj, en aliaj sovetaj respublikoj kaj eksterlande.

La nuntempa latva lingvo sin bazas sur la lingvo de iama balta gento de latgaloj, kiu en daŭro de sia evoluo intermiksiĝis kun la idiomoj de seloj, zemgaloj, kuroj, livoj kaj aliaj gentoj, vivintaj sur la teritorio de Latvia SSR. Hodiaŭ ekzistas tri ĉefaj dialektoj de la latva lingvo: la okcidenta dialekto aŭ la dialekto de "tamanoj", kiun forte influis la lingvoj de kuroj kaj livoj, la orienta kun multaj elementoj slavaj kaj la meza dialekto, kiu fariĝis la oficiala lingvo de la lando kaj la lingvo de la latva literaturo.

La plej parenca al la latva lingvo estas la lingvo litova, ankoraŭ nun posedanta multajn arkaikajn formojn, kiujn la latva lingvo jam plu ne havas. Por komparo jen kelkaj latvaj kaj litovaj vortoj:

Laŭlonge de
la rivero
Daugava en
Riga, la
ĉefurbo de
Latvujo

Latva	Litova	Esperanta
roka	ranka	mano
mâte	mote	patrino
tîkls	tinklas	reto
krîtu	krintu	mi falas
vilks	vilkas	lupo
têvs	têvas	patro
tauki	taukai	lardo

Parenca estas la latva lingvo ankaŭ al la lingvoj slavaj kaj aparte al la lingvoj rusa kaj pola. Tion atestas



Ed. Jaunvalks

multaj vortoj komunaj por ĉiuj tri lingvoj. Jen kelkaj ekzemploj:

Latva	Rusa	Pola	Esperanta
doma	duma	duma	penso
roka	ruka	ręka	mano
galva	golova	głowa	kapo
liepa	lipa	lipa	tilio
katls	kotjol	kociol	kaldrono
vârna	vorona	wrona	korniko

Historiaj esploroj montras, ke la antikvaj latvoj ne vivis izolaj sur sia tereno. Ili interrilatis kaj komercis kun foraj popoloj kaj apudaj najbaroj, kio ne povis ne influi la kulturon kaj la lingvon de la popolo. En la 12-a jarcento la teritorion, sur kiu vivis la latvaj gentoj, invadis germanaj krucmilitistoj, kiuj koloniigis la landon kaj sklavigis la popolon. Poste en la daŭro de la historio apartaj terenoj de Latvujo apartenis al Svedujo kaj Polujo. Depost 1721 Latvujo fariĝis parto de Ruslando. Nature estas, ke tiuj popoloj multon kontribuis al la pliriĉigo de la latva lingvo. El la nordgermana lingvo venis nomoj de diversaj instrumentoj: âmurs (martelo), êvele (rabotilo), zâgis (segilo), lukturis (lanterno), kaste (kesto) kaj aliaj. La sveda lingvo kontribuis: gatve (vojo), skapis (ŝranko), slims (malsana), vadmala (drapo) ktp.

La plej malnovaj spuroj de la latva lingvo — nomoj de personoj kaj lokoj — estas troveblaj en antikvaj kronikoj jam ekde la 13-a jarcento. La plej malnovaj libroj en la latva lingvo estas la katolika kateĥismo de Canisius (1585) kaj la luterana kateĥismo de Rivius (1586). La lingvo de ambaŭ estas kripla, la ortografio ankoraŭ konfuza. En 1655 estis publikigita



la Nova Testamento kaj en 1689 la Biblio. La lingvo de tiuj libroj fariĝis bazo, sur kiu poste evoluis la latva literaturo. La unua gramatiko de la latva lingvo "Adolfius, Erster Versuch einer kurz verfassten Anleitung zur lett. Sprache" aperis en 1685. Ampleksan kaj sciencon gramatikon post multjara esplorado eldonis en la germana lingvo konata latva lingvisto J. Endzelīns ("Lettische Grammatik", 1922). Antaŭnelonge la Instituto pri latva lingvo kaj literaturo aperigis monumentan verkon "La gramatiko de moderna latva lingvo" ("Mūsdienu latviešu literārās valodas gramatika", Vol. I, 1959; Vol. II, 1962).

Prononcnuancoj ŝanĝas sencon

Por la latva lingvo estas karakterizaj longaj kaj mallongaj vokaloj, kiuj povas al la vortoj doni novan signifon, ekzemple: "lapa" — folio, "lāpa" — torĉo; "pile" — guto, "pīle" — anaso; "reta" — malofta, "rēta" — cikatro; "plukt" — senkoloriĝi, "plūkt" — pluki. Krom tio la vokalo "e" povas esti aperta kaj malaperta, kion oni devas nepre observi en la prononcado.

Ekzistas ankoraŭ "tira" kaj "rompa" prononcmaniĝero de vokaloj, kio ankaŭ povas aliigi la sencon de la vortoj, ekzemple: — "lādēt" — ŝarĝi, "lādēt" — malbeni, aŭ "zāle" — salono kaj "zāle" — herbo. Laŭ reguloj de la ortografio oni la elparolon per aparta signo ne diferencigas. Al la latvoj tio malfacilaĵon ne kaŭzas, sed personoj, ne apartenantaj al la latva nacio, ofte eraras, laŭtleĝante multajn latvajjn vortojn. La latva lingvo posedas nur malmultajn diftongojn, nome "ai" ("ainava" — pejzaĝo), "au" ("kauns" — honto), "ei" ("teika" — legendo), "ui" ("puika" — knabo). Al la diftongoj apartenas ankaŭ "o", kiun en latv-devenaj vortoj oni elparolas kiel "uo" aŭ "ua" ("u" mallonge elparolata), sed en vortoj prunteprenitaj el aliaj lingvoj — kiel "o", ekzemple, kiel en vortoj "moderns", "motors" aŭ "kolekcija". Specife latva estas la sonkombino "ie" kun "i" mallonge prononcata, ekzemple en vortoj "prieks" — ĝojo, "liels" — granda, "siena" — muro, vando.

Voĉaj konsonantoj antaŭ senvoĉaj fariĝas mem senvoĉaj. Tiel oni prononcas la vortojn "labprāt" — lapprāt, "augt" — aukt, "lūzt" — lūst. Tamen en la ortografio estas observata la morfologia principo. Oni skribas "logs" (log-s, log-a) kaj "loks" (lok-s, lok-a), kvankam en nominativo ambaŭ vortoj sonas



Ĉi tiu dancparo portas la tradician kostumon de la latva popolo.



egale. La signifo de la unua estas "fenestro", de la dua "arko". Same "kāds" (kād-s, kād-a) — kiu, kaj "kāts" (kāt-s, kāt-a) — tenilo.

La akcento estas ĉiam sur la unua silabo.

Forma riĉeco de la gramatiko

La gramatikon de la latva lingvo karakterizas riĉeco de formoj: ok deklinacioj, sep kazoj, tri konjugacioj, ses verbaj tempoj. Speciala kazo "lokativo" montras "en kio io au iu troviĝas": "istabā" — en ĉambro, "kabatā" — en poŝo, "lejā" — malsupre. Ĉe la verboj aparta devontiga modo esprimas, ke "io estas farenda, devas esti farita": "man jāraksta" — mi devas skribi, "man jāiet" — mi devas iri. La signo de tiu modo estas la prefikso "jā-". En la latva lingvo mankas posesivaj adjektivoj. Anstataŭ ili oni uzas la genitivan de substantivo. La latvoj ne povas diri "patra amo", sed diras "amo de patro". Ĉar en la latva lingvo la difinanta vorto ĉiam staras antaŭ la vorto difinata, fakte oni diras "de patro amo" — tēva mīlestība.

Ĝis 1922 oni uzis en la latva lingvo la gotan literaron por preso, la latinan kun kelkaj negrandaj modifoj — por skribo. La skribmaniero estis transprenita de la germana lingvo — do nefonetika. Ekzistis la literkombinoj "sch", "tsch", "zch". La longajn vokalojn oni skribis pere de la litero "h" — ah, eh ktp. Nur en 1922 sub premo de progresemaj rondoj oni oficialigis la latinan alfabeton kun kelkaj speciale por la latva lingvo kreitaj suplementaj literoj. Tiuj literoj estas: â, ê, î, û por longaj vokaloj ("o" en la latva

SENDORMEMO

*Akras la nel-to kiel glavpinto,
kiam la sendormemo aliras
serpentopaŝe
mian memon sopirantan sinforĝeson
kaj glitkaŝe rampas en kovejon
de l' inkuboj, kiuj ekzumas
kvazaŭ abeloj furiozaj.*

*La grizaj virgulinoj de l' sendormo
grimacieme vorticiras
ĉirkaŭ niajn pensojn
kaj per nebulfadejoj blankaj
interplektas araneajn retojn,
kie implikiĝas seneskape
miaj vivsopiroy sangovarmaj
kiel ĵusŝirita vundo.*

*La manoj de lanuta ĉelo tradas
kvazaŭ troscapdoj multajn noktojn
l' inkandescanĝantojn de la vivo
kaj ekserĝas senkonscion,
ke senutulas la vivo ĝis mia nuna
kreavida, ĉar pratinio plove,
tra alsuĉa funeltruo,
en la nigrajn grotojn de l' nenio
min sinkigas, ĉiuhiste suferantan.*

lingvo estas ĉiam longa), g, k, l, n (kun subsigno) por jotitaj konsonantoj (en aliaj okazoj oni tamen uzas bj, mj, pj, vj) kaj tri konsonantoj kun supersignoj: ĉ, ŝ, kaj ž, kiuj respondas al la esperantaj ĉ, ŝ kaj ĵ. La sonon "ĝ" oni skribas per la literkombino "dž". La nova alfabeto kaj ortografio disvastiĝadis malrapide. Kvankam oni ĝin instruis jam en lernejoj, la ĵurnaloj ankoraŭ dum multaj jaroj estis presataj per la gota literaro, ĉar la homoj pli maljunaj nur tre lante alkiutimiĝadis al la nova skribmaniero. Hodiaŭ estas uzata nur la latina alfabeto.

Paidagogija

Dum longa tempo oni ne povis interkonsenti pri skribmaniero de tiel nomataj "internaciaj" vortoj — terminoj de scienco kaj tekniko. Temis pri longeco de vokaloj en tiuj vortoj. La pli maljuna generacio lernis en lernejoj, kie la instrulingvo estis la germana. Poste sekvis periodo de rusigo (ĝis 1917) kaj la instrulingvo fariĝis la rusa. Ĉar en la germana kaj la rusa lingvo la vokalojn en la latin- kaj grekdevanaj vortoj oni prononcas malegale (ekzemple: ruse "krítika", germane "Kritik"), tio kaŭzis miskomprenojn. Oni do decidis transpreni la vortojn el la lingvoj latina kaj greka kaj noti la longecon de vokaloj laŭ la kutimo de antikvuloj. Aperis en la libroj kaj en la ĵurnaloj tiaj vortoj, kiel "paidagogija", "higiaina", "sfaira", "mûzejs" kaj aliaj. Ĉar tiun skribmanieron oni multe kritikis, ĝi estis baldaŭ forĵetita. Oni decidis tute ne montri la longecon de la vokaloj en la "internaciaj" vortoj. Ankaŭ tio praktike montriĝis neoportuna. De post 1957 oni denove prinotas la longecon de la vokaloj tiel, "kiel oni elparolas en la literatura lingvo".

La vortaro de la latva lingvo estas riĉa, diversflanka, posedas grandan nombron da sinonimoj. Precipe riĉa estas la terminaro pri agrikulturo. La vortaro de latva lingvo, kompilita de K. Milenbach kaj J. Endzelīns enhavas 110 410 vortojn. Tamen en ĝi ne estas troveblaj multaj vortoj el folkloro, el verkoj de modernaj verkistoj (neologismoj) kaj terminoj de scienco kaj tekniko.

La frazaro kaj esprimmaniero de la latvoj estas konkreta, plena je metaforoj kaj bildoj. La latvoj diras "implikiĝi en malagrablaĵojn", "bone nutrita, grasa loko", "nek mia kampo, nek mia porko", "la suno saltas" (leviĝas) ktp.

Mankas en la latva lingvo la ebleco esprimi multajn nuancojn de abstraktaj nocioj, kio parte dependas de neebleco derivi adjektivojn de multaj substantivoj en tia kvanto, kiel oni tion povas fari en aliaj lingvoj, parte de tio, ke la latvoj perceptas la vivon konkrete kaj artisme, sed ne intelekte kaj abstrakte. Tamen tute senpova la latva lingvo tiurilate ne estas. Vortojn, kiujn la lingvo mem ne posedas, ĝi prunteprenas de aliaj, ekzemple: "naturāls" — natura, "stacionārs" — surloka, "longitudionāls" — laŭlonga, "intolerants" — netoleranta, "indirekts" — malrekta.

La latva lingvo posedas hodiaŭ jam riĉan literaturon, al kies kreo kontribuis multaj centoj da verkistoj. Dank'al ili la lingvo rapide evoluis, fariĝis ankoraŭ pli elasta kaj esprimoplena. Inter la latvaj verkistoj troviĝas ankaŭ geniaj spiritoj, kies verkoj havas signifon por la literaturo tutmonda. Unu el ili estas Jānis Rainis, kies centjaran naskiĝdaton oni celebris en 1965. Estas li, pro kiu la konata rusa verkisto Maksim Gorkij skribis: "Ne ekzistas tia malgranda nacio, kiu ne estus kapabla doni grandajn majstrojn de literaturo. La latvoj kreis Rainis."

POR PLI EFIKA INFORMADO

IVO LAPENNA

Kiam la gazetaro (ankoraŭ ne sufiĉe ofte) skribas pri la Internacia Lingvo, ĝi kelkfoje misinformas la publikon, ĉu intence, ĉu pretervole. Ĉi-sube prof. Lapenna daŭrigas la artikolserion pri la Principaro de Frostavallen, komencitan en la juli-aŭgusta numero.

3. Kiel redukti misprezentojn?

Inĝ. Rudolf Kratzmann (F.R. Germanujo) skribis al ni interesan leteron, kies esenco estas:

“Ĵurnalistoj nacilingvaj, raportante pri Esperanto-okazaĵoj, emas aŭ aldoni al nia proponita teksto sian propran, ofte por Esperanto malpli favoran, opinion, aŭ forstreki parton, kio peras al la publiko malkorektan impreson. Tial ni (UEA, landaj asocioj, lokaj grupoj, k.s.) pagu al la gazetoj por publikigo de nia teksto sen ŝanĝoj fare de la ĵurnalistoj.”

La leteron ni jam koncize respondis en la novembra numero. Ĉi tie ni pritraktos pli detale la temon.

Efektive, ofte okazas, ke ĵurnalistoj — ĉu pro malico, ĉu pro manko de scioj aŭ pro miskomprenoj — erare prezentas aferojn rilate al Esperanto. Eĉ en la raportoj pri la ĵus okazinta Universala Kongreso en Vieno aperis kelkaj eraroj aŭ misprezentoj, kvankam, ĝenerale, la gazetaro kaj de Aŭstrujo kaj de multaj aliaj landoj informis objekte, ofte tre favore, dank’ al Kongresa Gazetara Servo (KGS).

Por eviti misprezentojn, la rimedo proponita de R. Kratzmann ne ŝajnas taŭga. Ĝi estas eĉ ne realigebla, ĉar seriozaj gazetoj ne kutimas akcepti ordinarajn tekstojn kontraŭ pago. Senkonsidere al tio, estus ege maloportune agi tiamaniere: objektivcon oni rajtas postuli senkompanse, certe ne en formo, kiu povus esti rigardata kiel subaĉeto. Temas ja pri artikoloj kaj informoj, ne pri reklamoj.

Por eviti aŭ almenaŭ maksimume redukti erarojn kaj misprezentojn ekzistas aliaj metodoj, jam elprovitaj en la praktiko kaj konformaj al la Principaro de Frostavallen.

La gazetaro skribas en formo de artikoloj, intervjuoj, raportoj pri iu gazetara konferenco, aŭ informoj pri iu evento.

Artikolojn pri Esperanto povas skribi kiu ajn: ĵurnalisto aŭ alia persono, kiu ne scias la lingvon kaj sekve riskas fari multajn erarojn eĉ sen malbona intenco, aŭ kompetenta konanto de la afero. Ofte okazas, ke en artikoloj pri diversaj aliaj demandoj, la Internacia Lingvo estas menciata en tiu aŭ alia kunteksto. Por preventi erarojn en artikoloj verkotaj de personoj sen kontentigaj scioj, plej bone estas helpi ilin per anticipa liverado de objektivaj faktoj. Se tio ne eblas, tiam la plej bona metodo estas reagi per leteroj al la redakcio. Kelkfoje sufiĉas tute mallonga letero kun konciza prezento de faktoj, kiuj korektas la erarojn kaj misprezentojn. Kelkfoje estas utile reagi per tuta artikolo. Se la verkinto de la misprezento aŭ eĉ ata-

ko estas iu konata persono, necesas atenti, ke la persono, kiu reagas, havu laŭ la ebleco similan socian pozicion. Kutime tio helpas. Se el komenca misprezento evoluas publika diskuto, eĉ polemiko, des pli bone, sed kondiĉe, kompreneble, ke la pledanto por la Internacia Lingvo konu perfekte la faktojn kaj sciu efike argumenti.

Se temas pri artikoloj liverataj al la gazetoj fare de la informaj faktoj de niaj organizaĵoj aŭ de unuopuloj, la plej bona asekuro kontraŭ arbitra ŝanĝado de la proponitaj tekstoj estas: doni tekstojn ĵurnalisme bonstilajn kaj maksimume adaptitajn al la karaktero de la koncernaj gazetoj.

En ambaŭ kazoj — kaj en multaj aliaj — estas utiligebaj diversaj CED-dokumentoj, la revuo “La Monda Lingvo-Problemo”, la bultenoj de nia Internacia Gazetara Servo (IGS) kaj de la KGS, kiel ankaŭ pluraj verkoj, ekzemple “Lingvo kaj Vivo” de G. Waringhien, “Zamenhof” de M. Boulton, “Retoriko”, Unua Parto, de la subskribinto, “Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro”. k.a.

Por eviti erarojn en *intervjuoj* plej bone estas peti la tekston antaŭ la publikigo. Seriozaj ĵurnalistoj volonte konsentas, ĉar ankaŭ por ili estas neoportune, ke enŝteliĝu eraroj, pro kiuj la intervjuito poste verŝajne protestos ĉe la redakcio.

Gazetarajn konferencojn oni povas aranĝi nur okaze de iu grava evento: kongreso, konferenco, vizito de iu elstara persono, k.s. Tiam konferencon necesas bone organizi. Tio signifas: centriĝi al la evento mem; prizorgi, ke nur kompetentaj personoj donu informojn; disdividi la taskojn inter tiuj personoj kaj nepre eviti kontraŭdirojn; prizorgi unuarangajn tradukantojn, se la informantoj ne scias la koncernan nacian lingvon; anticipe prepari dosierojn por la ĵurnalistoj kun koncizaj resumoj de la informoj, dokumentoj rilatantaj al la evento kaj iu ĝenerala dokumento pri la Internacia Lingvo, ekzemple la konata CED/7 (Bazaj Faktoj). Se la GK estas tiel preparita, nur escepte povas okazi eraroj aŭ misprezentoj.

La samaj principoj koncernas ankaŭ mallongajn *informojn*. Efektive, la informaj faktoj de niaj landaj asocioj devus regule liveradi al la nacilingvaj gazetoj taŭgajn informojn pri ĉiuj pli gravaj eventoj en ligo kun la Internacia Lingvo. Tiucele estas bonege utiligebaj la bultenoj de la IGS kaj ankaŭ aliaj materialoj, kiujn publikigas UEA.

Observado de la supraj sugestoj certe reduktos la misprezentojn, kiuj sendube ĝenas la pli rapidan disvastiĝon de la lingvo, ĉar ili kreas falsan imagon pri ĝi kaj pri la Esperanto-movado en la publika opinio.



NEMALHAVEBLA MALDECANEKDOTARO

Recenzas R. Cash (Rotterdam)

Kruko kaj Baniko el Bervalo, de Louis Beaucaire.
Kopenhago: TK, 1970. 144 p. Ilus. Ofset.

Ĝi estas . . . nu . . . *unika*. T.e. unika en la movado. Jam ne mankas al ni "maldecaĵoj", sed tiu ĉi estas la unua el tiu, kiu estas tre ŝatata literaturspeco en la mondo. Mi preskaŭ emus kromnomi ĉi tiun libron "Libro de amo por povruloj". Sed tio ne estus vera, ĉar kiu elspelus dek ses guldenojn por maldecaj spritaĵoj, se ne estus en Esperanto? Oni povus nomi la verkon plua progreso en la evoluo de nia literaturo — en la plej ekstreme larĝa senco de la vorto "progreso". Grava atingo ĝi ne estas, sed almenaŭ plaĉa atingeto. Normalaj homoj (kaj finfine plejpartaj esp-istoj estas tiaj) ŝatos ĝin — ĉar el la maldecaj spritaĵoj, multaj estas maldecaj, kaj multaj, spritaj. Mi estis kaptita ekde la unua anekdoto — jam perdita! — kaj fakte renkontis plurajn "malnovajn amikojn" dum la sekva ridlego.

Kiel esperantaĵo ĉi volumeto estas nemalhavebla. Kiel maldecanekdotaro . . . nu, ĉifoje mi elpoŝigos la prezon — oni jam kutimas la premmalhelpojn al la Esperanta eldonado — sed ontaj anekdotaroj iom pli moderu (sed ne pli decu!).

Se nenion alian, Beaucaire aldonas al la riĉiĝanta Esperanta trezorejo unu plian perlon: la "bervalajon". Konu sprite ĉi senmoran amuzaĵon!

Mendu ĉe UEA: 16 gld. + sendkostoj 10%.

KONDIĈOJ DE RECENZOJ

La revuo *Esperanto* principe recenzas duope ricevitajn novajn librojn, broŝurojn kaj diskojn. Unuope ricevitajn, kiel ankaŭ politikajn aŭ religiajn eldonaĵojn, ĝi nur mencias. Nepetitaj recenzoj ne aperas.

APLAŪDINDA LABORO

Recenzas W.J. Nijveld (Amsterdamo):

Esperantaj normoj — Kemio — 00002: Fermentoj,
de Jan Pióro. Warszawa: Polski Związek Esperantys-
tów, 1970. Mimeo. 14 p. 30 cm.

Tiu ĉi stencilaĵo estas propono de nomenklature pri fermentoj, do speciala branĉo de la kemio. La unuaj sep paĝoj donas ĝeneralajn regulojn; la cetero estas listo de ĉirkaŭ 250 terminoj rilatantaj al la fermentoj. Nacilingvaj ekvivalentoj ne estas donitaj. La granda plimulto de la terminoj estas tuj rekonebla pro ilia internacieco. Laŭ la aŭtoro la nomoj estas adaptitaj laŭ Internacia Fermenta Komisiono 1964, sed ĉe la esperantigo la aŭtoro sekvis la proponojn, kiujn li mem starigis antaŭ kelkaj jaroj. Oni renkontas tie kelkajn strangaĵojn, kiujn certe ne ĉiu fakulo akceptos, ekz-e *reduki* por redukti, *ogzalata acido* por oksalata acido, la finaĵo *-azao* por nacilingva -ase.

Estas aplaŭdinde, ke ĉi tiu laboro estas farata, sed pli granda uzontaro devos decidi pri nombro da detaloj.

KANTOJ, KIUJ MERITAS POPULARIĜI

Lipruô teruras min!

poez. k muz. Konisi gaku

1) Ki-am an-ko-raū es-tis mi in-fa-no,
2) Tuj naj-ba-re lo-gis a-mi-ki-no,
3) Es-tis mi en u-ni-ver-si-ta-to,
4) I-ris mi al dol-ča ren-de-vu-o

i-am mur-mu-ris Fra-njo dum la ba-no: "Lip-
lu-dis ni in-ti-me laū ku-ti-mo. Lip-
čar-mis la ksa-bi-noj je kor-ba-to. Lip-
en ar-ba-ro fer-de ur-ba-bru-o. Lip-

ru- gon do fin-ti-ne u-ri pro-voj mi, čar
ru- kon se-tis si en la in-fa-na fest', ir-
ru- kon i- li taj a-pli-kis sen dis-kut', ra-
ru- go to-ma min re-pu-sis al he-nit', sen

ti-el šar-man kna-ben kap-ti go-voj m.,
no-ris min su-ti-je kun ma-jes-ta fest', LIP-
pi-de šun-pis la po-en-toj en la stad',
ki-se mi tor-i-ris spi-te de i'an-vit'.

RU- GO TE- RU- RAS MIN!

Apude: unu el la dek unu kantoj de la kolekto "Venu amikoj".

Recenzas Ramona van Dalsem (Hago)

Venu amikoj, de Konisi gaku (komp.). Oosaka: Kansai-Ligo de Esperanto-Grupoj, 1970. 12 p. Ofset. Kun muziknotoj. 26 cm.

Ĝi enhavas dek unu kantojn; la lasta estas tute de li mem laŭ teksto kaj melodio. La aliaj estas de li tradukitaj laŭ japanaj tekstoj, kaj du estas eĉ amerikaj (aŭ angle?) devenaj: kantoj, kiuj plejparte iel temas pri milito, sed ankaŭ iom petolaj kantoj, kiel "Puff," la magia drako, kiu gardas la maron, kaj "Lipruĝo teruras min", kiu estas kvazaŭ vira protesto kontraŭ virina vanteco.

Ĉarma estas la lulkanto "Ne lasu ĝin kanti al via amata". Malgranda rimarko pri la teksto: anstataŭ "patr'" pli taŭgas "paĉj'", kio kantate estas pli bone komprenebla. La monotoneco de kelkaj melodioj havas specialan ĉarmecon, ankaŭ por tiuj, kiuj ne kutimiĝis al orienta muziko. Kun moderna akompanaĵo kelkaj kantoj eĉ povus fariĝi popularaj.

La kantareto certe estas gajno por kantamantoj, kiuj volas havi repertuaron internacian.

Mendu   UEA: Prezo anoncota.

Brazilo

- La Esperanto-Klubo Resende kaj la delegito de UEA en Resende sukcese organizis en septembro 1970, Esperanto-ekspozicion en 6 mezgradaj kaj superaj lernejoj de la urbo. Pli ol dek mil studentoj kaj profesoroj informiĝis pri la Internacia Lingvo.

Britujo

- "La kimra lingvo kaj la magistrato" estas la titolo de ĵus-publikigita anglalingva broŝuro de Robin Lewis, kiu proponas, ke magistratoj eldonu dulingvajn oficialajn formularojn anstataŭ apartajn en la kimra kaj en la angla, kio lasta "emas al kreo de du klasoj en la socio".

Bulgarujo

- Lastatempe ekaperis la informa bulteno *Esperantski vesti* (Esperantistaj informoj) kiel organo de Bulgara Esperantista Kooperativo. Nacilingva, la bulteno, kies eldonkvanto estas 1 500 ekzempleroj, estas senpage sendata al la gazetaro kaj al la kulturaj kaj klerigaj instancoj en la lando krom al la membroj de la Kooperativo.

Ĉeĥoslovakujo

- En la 8-a de novembro 1970 okazis Renkontiĝo de esperantistoj en la pro vino fama urbo Mělník. Kolektiĝis 220 personoj, altirite de la sunbrila dimanĉo, krom reprezentanto el Germana Demokratia Respubliko kaj kvinopo el Aŭstrujo.

Francujo

- La 10-a Paska Kultura Semajno okazos en la kastelo Grésillon, Baugé, de la 4-a ĝis la 9-a de aprilo 1971. Inter la kunlaborantoj troviĝas s-ro J. Thierry, estrarano de UEA. Informoj peteblaj ĉe s-ro R. Llech-Walter, 5 quai Vauban, F-66-Perpignan.
- La 63-a Franca Kongreso de Esperanto okazos en Lyon, de la 9-a ĝis la 13-a de aprilo. Krom la kutima programo okazos allogaj ekskursoj. Eksterlandanoj estas bonvenigataj. Informojn donas: Liona Esperantista Societo, 7 rue Major Martin, Lyon 1.
- Dum la regiona kongreso, okazinta en Lyon en aprilo 1970, oni inaŭguris straton Zamenhof kun ĉesto de la urbestro kaj aliaj aŭtoritatuloj.

F.R. Germanujo

- En *DK-Mitteilungen*, organo de la Klasifa Komitato de la Germana Komitato pri Normoj, aperis artikolo frontpaĝa de Rüdiger Eichholz "Kvarlingva vortaro laŭ la decimala klasifo (Esperanto/angla/germana/franca)", en la germana lingvo. Ĝi priskribas la sistemon de la slipara vortaro, kiun eldonas la aŭtoro.
- La kampanjo "TEST 5000" de Hermann Behrmann atingis entute ĉ. 5 500 interesiĝantojn, el kiuj inter 3 700 kaj 3 800 el 43 landoj efektive daŭrigas la studadon per la programita Esperanto-kurso germanlingva. Krome s-ro Behrmann lastatempe alicelle lanĉis internaci-skalan enketadon ĉe la publiko pri la lingva problemo per 3 demandoj. Dum la lastaj du jaroj simila enketado okazis en F.R. Germanujo fare de li kaj aliaj junuloj. La rezultoj de la enketado estas utiligotaj en la instruista kaj studenta medioj. Kunlaboron atendas: s-ro H. Behrmann, Bahnhofstr. 54, D-4972 Löhne.

Germana Demokratia Respubliko

- Okazos la 20-an de marto 1971 en Leipzig Inter-

nacia Renkontiĝo, kie parolos eksterlandaj gastoj. Informojn donas: Germana Kulturligo (Esperanto), DDR-701 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Str. 115.

- La unua tutrespublika renkontiĝo de la esperantistoj de Germana Demokratia Respubliko okazis de la 25-a ĝis la 27-a de septembro 1970 en la urbo Karl-Marx Stadt. Pli ol 200 personoj partoprenis ĝin, havis fakkunvenojn, ekskursojn kaj artan programon, kion raportis la gazetaro.
- Dum la jaro 1969 en G.D.R. okazis pli ol 80 Esperanto-kursoj kun pli ol 1 200 kursanoj. La lernolibro *Wir lernen Esperanto sprechen*, eldonita en 1968 kun eldonkvanto de 10 000 ekzempleroj, estas preskaŭ elĉerpita. Oni planas eldoni novan vortaron en 1971.
- La kolora filmo "Germana Demokratia Respubliko dum 20 jaroj" estas jam sinkronigita en Esperanto kaj baldaŭ estos disponigita al la internaciaj kaj naciaj Esperanto-organizaĵoj. Tion raportis ankaŭ ĵurnalo *Volksstimme* (8.9.1970).

Hindujo

- En la 12-a de oktobro 1970 ekster la Plejsupera Kortumo arestiĝis 36 manifestaciintoj kontraŭ la angla lingvo, kiuj insistas, ke la uzo de la hindia kaj aliaj regionaj lingvoj estu permesata en la kortumoj.
- La unua numero de dusemajna poresperanta gazeto *Fellow Thinker* aperis en novembro 1970. Anglalingva, ĝi estas eldonata de Hinda Instituto de Esperanto cele al disdoniĝo ankaŭ inter neesperantistoj eĉ ekster Hindujo. 15 ekz-oj de unu numero kostas 2 guldenojn. La adreso de la Instituto: Post Box 604, New Delhi-1.

Hungarujo

- La Hungara Esperanto-Muzeo en Szeged, nun pli ol dekjara, apartenas al la unuaj 10 Esperanto-bibliotekoj de la mondo. Ĝiaj 2 300 libroj, 350 jarkolektoj de periodaĵoj kaj aliaj dokumentoj estas je dispono de vizitantoj. La fondinto de la Muzeo, s-ro Ernesto Farkas, daŭre klopodas pligrandigi la stokon, gardantan en la urba muzeo.

Israelo

- En la 3-a de oktobro 1970 la israela radio disaŭdigis programon pri Esperanto dum 40 minutoj, intervjuante d-ron H. Mašler, fakdelegiton de UEA pri medicino en Tel-Aviv.
- Okazis en Tel-Aviv dum unu semajno en oktobro 1970 ekspozicio kun temo "Turismo kaj Esperanto". Vizitis ĝin centoj da homoj, kaj du tagĵurnaloj raportis pri ĝi favore.

Pollando


- De post 1957 ĉe la Ŝtata Muzika Liceo kaj la Fundamenta Muzika Lernejo en Wrocław restas vigla la Esperanta Rondo. La gvidanto de la Rondo, prof-o J. Smykalski, estas salajrata el la ŝtata buĝeto, kvankam la Esperanta leciono estas fakultativa.

Rumanujo

- En *Szatmári Hírlap*, hungarlingva ĵurnalo por

KE — PERSONE

Distingojn pro la agado por Aŭstrujo per Esperanto ricevas kvar membroj de AEF (de dekstre: d-roj Scheibenreiter kaj Halbedl, s-roj Mudrak kaj Dürschmid) la 23-an de oktobro en la Ministrejo por Instruo kaj Arto, Vieno.



la distrikto Satu-Mare, aperis artikolo "Ni legu Esperante" (16.8.1970).

Usono

- En la Universitato de Dayton okazas dum ĉi tiu vintra studperiodo konferenco de universitatanoj, kiuj parolas Esperanton. La Historia Fakto de la Universitato subvencias la konferencon per 300 usonaj dolaroj. Organizas ĝin d-ro Richard Wood, Louisiana State University, Baton Rouge, Louisiana 70803.

FAKE

Fervojo

- La 23-a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio okazos de la 15-a ĝis la 21-a de majo 1971 en Maribor, Jugoslavio. La kongreskartoj, kiujn la kongresanoj ricevos poŝte post pago de la kotizo, validos ankaŭ kiel senpaga fervoja bileto tra Jugoslavio dum majo 1971. Eldono de fervojista terminaro nun estas preparata. Informojn donas: 23-a Kongreso de IFEF, YU-62-000 Maribor.

Komerco

- La pasint-jara Internacia Foiro de Barcelono, Hispanujo, eldonis murafiŝojn en 5 lingvoj: 10 000 ekzemplerojn de grandformataj afiŝoj en la hispana, 5 000 en Esperanto, po 2 000 en la angla, franca kaj germana, kaj la malgrandformatajn en simila proporcio. Ĝis la pasinta jaro la Foiro eldonis la afiŝojn tradicie en diversaj aliaj lingvoj, inkluzive de la araba kaj japana.

Lavado/Tinkturado

- La germanlingva monata gazeto *Der Chemisch-reiniger und Färber* nun ŝanĝis sian titolon al *Chemisch-reiniger-Wäscher-Färber-Zeitung* (Gazeto por sekpurigistoj-lavistoj-tinkturistoj). Ĝi enhavas jam 4 jarojn i.a. esperantlingvajn resumojn. Abonebla per la libroservo de UEA.

Literaturo

- La 2-an Kongreson de Polliteraturaj Tradukistoj en 1970 ĉeestis s-ro T. Tyblewski, pola membro de UEA, invitive oficiale de la Aŭtora Agentejo en Pollando. Partoprenis ĝin ankaŭ s-roj J. Uśpieński, estrarano de UEA, kaj A. Pettyn, komitatano de UEA.
- La tre konata klasika nederlandlingva infanlibro *Afke's tiental*, aperinta en 22 naciaj lingvoj, estas tradukita en Esperanton sub la titolo *La dekopo de Afke* de s-ino T. Brinkman, kiu nun serĉas eldoniston.

Medicino

- En la hispana medicina gazeto *Noticias Médicas*, kiun ricevadas ĉiuj hispanaj kuracistoj, aperis artikolo pri la manko de la lingva kapablo de la kuracistoj pro la internaciskala evoluo de la nuntempa medicino. Reagis al tio esperantista kuracisto d-ro R. Herrero. Tiu reago kaŭzis ree ĉe multan interesigon ĉe la kuracistoj rilate al la Internacia Lingvo.

Scienco

- En la teknika universitato de Eindhoven (Nederlando) doktoriĝis s-ro Jan de Graaf pri matematika fiziko. Lia disertacio *Linearaj dinamikaj sistemoj en hilbertaj spacoj* aperis kun detala resume en Esperanto.

Sennaciismo

- En 1971 Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) festos sian 50-jaran jubileon en Parizo, de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto. Tri postkongresaj semajnoj estos organizitaj: la unua ĉe la Esperantista Kulturdomo Grésillon, la dua ĉe Alpoj kaj la tria ĉe mediteranea marbordo (Balaruc-les-Bains). Informojn donas: SAT, 67 avenue Gambetta, F-75 Paris 20^e.

PERSONE

Alonso-Núñez

- Hispana statistikisto s-ro Antonio Alonso Núñez serĉas kontakton kun personoj, kiuj prove instruis Esperanton al eksterlandaj laboristoj (gastlaboristoj) en Eŭropo. Lia adreso estas: Michelen 16-4^o, Pontevedra, Hispanujo.

Wüster

- En festparolado la 23-an de oktobro 1970 okaze de la 50-a datreveno de la Aŭstra Instituto por Normigo, la federacia prezidanto de Aŭstrujo, Franz Jonas, aparte laŭdis la internacie rekonitan laboron de d-ro Eugen Wüster (honora membro de UEA) sur la kampo de normigo.

Tro modesta aspekto de la revuo "Esperanto"?

Skribas F. Charlet (Francujo):

Mi miras pro la opinio de s-ro Wohlberg (en n-ro nov. 1970, p. 174) pri la aspekto de nia revuo *Esperanto*. Kompreneble, por la malnovaj fidelaj legantoj, kiuj interesiĝas ĉefe pri la enhavo, la aspekto ne tre gravas; sed agrabla aspekto estas nepre necesa 1) por varbado de novaj abonantoj kaj 2) por informado en neesperantistaj medioj. Pro tio, mi opinias, ke la revuo aspektas *tro* modeste, kaj mi dezirus almenaŭ iom pli fortikan kovrilon. Mirante, ke *Kontakto* (kiu estas necesega kaj kiun mi ankaŭ subtenas) aspektas tiel lukse, mi pensas, ke ambaŭ revuoj povus uzi similajn paperojn: la paperon de *Esperanto* por la internaj paĝoj kaj la paperon de *Kontakto* por la kovriloj.

Respondas la redakcio:

Estus bele doni al la revuo *Esperanto* pli dikan kovrilon, sed tio en la nuna stadio estus konsiderinde pli kosta pro la fakto, ke la revuo estas 24-paĝa, kaj estas presata po 4 samflankaj paĝoj. Uzi alispecan paperon por la kovrilo signifus, ke la presmaŝino devus turniĝi unu plian fojon. Tio povus pliigi la preskoston je eble 10%. Ĉu tio valoras?

Pri la organo de TEJO, *Kontakto*, decidas TEJO mem. Sed estus eble havi priparolon inter la respektivaj redakcioj.

Unu rimedo, tamen, povus rapide konduki al pli luksa aspekto de la revuo: grandigo de la nombro de

anoncoj. La Estraro nun faras kampanjon por varbi anoncojn en difinitaj landoj, sed ĝenerale ne estas facile varbi anoncojn el la Centra Oficejo sen personaj kontaktoj. Al ĉiu, kiu pretas provi tion surloke, la Centra Oficejo en Rotterdam volonte disponigos specimenajn ekzemplerojn kaj folion kun presteknikaj detaloj.

Dankinda servo delegita

Skribas J.D. Brakel (Rotterdam):

En julio 1970 miaj infanoj vizitis Aŭstrujon kaj volis partopreni la festivalon en Salzburg. Sed . . . jam en januaro 1970 la enirbiletoj estis forvenditaj. Al la delegito en Salzburg, prof. h.c. Richard Grössinger, mi konigis la problemon. Kvankam li tuj respondis, ke la biletoj ne estas haveblaj, li tamen estis preta viziti la koncernan oficejon kun la demando, ĉu eble iuj biletoj revenis. Per persista penado li fine sukcesis ekhavi 4 biletojn: du por la infanoj kaj du por amikoj. S-ro Grössinger mem nomas tion miraklo. La infanoj estis tre feliĉaj. Eĉ aŭstroj enviis ilin, kiam ili aŭdis, ke niaj infanoj partoprenis tiun muzikfeston. Al s-ro Grössinger koran dankon pro lia eminenta helpo!

MALFACILAĴOJ ĈE MONDA KONFERENCO EN NAIROBI

Afrikanoj aliĝis malfrue al la rondoj de internaciaj konferencoj, sed ĉiam pli ilia partopreno konsciigas ilin, ke neniu el la hereditaj koloniaj lingvoj sufiĉas sola por monda uzo.

La stilo kaj lingvo de la konferenco de la Monda Ligo de Protestantaj Eklezioj en Nairobi (20 aŭgusto 1970) estis angla-usonaj, kvankam oni tradukis samtempe en la lingvojn germanan kaj francan. La delegitoj de Latina Ameriko petis la agnoskon de la hispana lingvo kiel oficiala lingvo, ĉar la diskutadon ili povis kompreni malfacile. Grandajn malfacilaĵojn havis ankaŭ franclingvaj afrikanoj. La konferenca stilo estis efika, sed la konferenco mem estis nepartoprenebla precipe por afrikanoj kaj azianoj. Malgraŭ multa pacienco de la asemblea prezidanto Thompson, ili ne povis partopreni la ĝeneralajn kunvenojn. Jen reala problemo por ĉiuj internaciaj konferencoj.

Remonstrants Weekblad, 23.9.1970



Psikologio de minuskloj

Skribas Karl Sommer (FR Germanujo):

En "esperanto" n-ro 779 (oktobro 1970) mi legis la demandon de d-ro Nassif Isaac rilate la aplikadon de minusklaj literoj en la titola paĝo de nia oficiala organo. Ankaŭ mia opinio estas: eviti la minusklojn. Pripensu, ke vi volas montri la fortecon de nia movado. Por esprimi tion, estus pli bone presi per majusklaĵoj. Ĉu ne estas grave utiligi ankaŭ psikajn influojn?

Respondas la redakcio:

Eble la majuskloj donas impreson pri forto, sed ni trovas, ke — almenaŭ en kelkaj landoj — minuskloj en titola paĝo donas impreson pri moderneco. Do kiun impreson ni preferu? Kion opinias aliaj?

La nomenklature de nomoj

Skribas Nikola Nikolov (Sofio):

Kun miro mi konstatis, ke iuj kursanoj post la vorto "antaŭnomo" en demandaro ne skribis siajn proprajn nomojn, sed la vortojn: doktoro, arkitekto, inĝeniero k.a. Kelkaj, kiuj ne havas profesion, kiu kutime estas menciata ĉe skribado aŭ elparolo de ilia nomo, metis streketon. Tio klare montris al mi, ke la vorto "antaŭnomo" donas eblecon de miskompreno. Verŝajne tiun vorton enkondukis sen sufiĉa pripenso iuj okcidenteŭropaj esperantistoj sub la influo de sia nacia lingvo. Ĉar Esperanto estas internacia kaj logika lingvo, ni devas anstataŭigi tiun vorton per la klara kaj neerariga "propra nomo".

UEA kaj la ceteraj Esperanto-organizaĵoj devas konsideri tion en la eldonado de demandaroj kaj aliaj formularoj, sur kiuj la esperantistoj devas skribi siajn proprajn kaj familiajn nomojn.

Respondas la redakcio:

Fakte la "antaŭnomoj" de preskaŭ triono de la tuta homaro estas la "familiaj" nomoj, kaj iliaj individuaj nomoj estas plejofte "malantaŭnomoj". Tamen, la "propraj nomoj" inkluzivas ne nur la homajn nomojn, sed ankaŭ la nomojn de la riveroj, urboj ktp., t.e. ĉiu nomo apartenanta ekskluzive al io. Do, la esprimo "propra nomo" estas pli miskompreniga, ol "antaŭnomo", kiu rilatas ĝenerale nur al la homa nomo. Estas fakto, ke en la UEA-eldonaĵoj troviĝas erarigaj esprimoj "voknomo" kaj "antaŭnomo". Feliĉe, pro la plia diversnaciigo de la oficistaro de la Centra Oficejo de UEA, ni jam komencis uzi por tiu celo la esprimon "individa nomo", kiu tamen povas solvi ne ĉian miskomprenon.

Atesti partoprenon de ISU

Skribas Tyburcjusz Tyblewski (Pollando):

Natura deziro de ĉiu klerema homo estas profiti ĉian eblon pliigi sian scion. Universalaj kongresoj de UEA ebligas tion regule. Tamen al la aŭskultantaro de Internacia Somera Universitato restas neniu materia postsigno de ilia partopreno, do la materia pruvo de ilia valora emo. Estas centoj da homoj, kiuj regule aliĝas al UK, el inter kiuj almenaŭ kelkdeko partoprenas regule ĉiujn sesiojn de ISU.

Tamen lastjaraj raportoj informas pri amasaj kaj tute hazardaj trapasantoj de ISU-salonoj, kiuj serĉante glaciaĵon misapertis la pordon.

Ĉu por bono de la unuaj kaj por tempoŝparo de la duaj ne estus prudente akcepti simblan pagon/abonon por sesioj de ISU aŭ por la lekcioj aparte? Tiu vere minimuma pago trankviligus la sciencavidajn kongresanojn, eliminus la preterpasantojn kaj garantius la fonduseton, kontraŭ kiu UEA povus doni al ĉiu ISU-aŭskultanto la ateston pri lia/ŝia partopreno. La atesto, konservata en hejmaj dosieroj aŭ montrata al la medianoj, rolus psike pozitive; ĝi estus la pruvo de la laŭdinda memlerna aktivado.

Respondas la sekretario de ISU:

La eldono de atestiloj ne estus tiel kosta en si mem, ke pro tio necesus postuli enirpagon. Sed ĉu ne impresas malserioze la disdono de atestiloj pri nura ĉeesto, kio ja nenion garantias pri sci-akiro? Akcepti pagojn kaj kontroli ĉeeston necesigas ĉepordajn deĵorantojn, kiuj ofte — pro simpla manko de homaj fortoj — ne estas disponeblaj.

"Irlanda" ⇔ "Ejra"?

Skribas Geoffrey Sutton (Rotterdam):

Ĉar prof. Waringhien uzis en sia prelego ("Esperanto", nov. 1970) la adjektivon "ejra", mi levus la demandon pri ĝia difino. "Ejra", kvankam ne erara, estas simple rekta, kaj sekve nenecesa, sinonimo de "irlanda". Problemo leviĝas ĉirkaŭ ĝia substantiva formo, kiu devenas de la irlanda vorto "Éire", kiu signifas "Irlando". En *Plena ilustrita vortaro* oni limigas ĝin al la Irlanda Respubliko, kvankam ĝia origina senco inkluzivas la tutan insulon.

Eble la vorto unue eniris Esperanton pro tio, ke multaj britaj (kaj eble aliaj) ĵurnalistoj erare uzas "Éire" en la limigita senco de la respubliko pro ĝia koncizeco.

Kvankam ĝia uzo en Esperanto estas ridinda (kp. uzon de "Dojĉlando" por unu germana respubliko!), tio ne signifas, ke la erara tendenco ne eble estos daŭrigita. Oni tamen demandas sin pri la stranga ludo, kiun estonta ĝisdatiganto de PIV devos fari, se la insulo iel reunuiĝos!

TEJO KONGRESOS EN SKOTLANDO

La 27-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en Edinburgh, ĉefurbo de Skotlando. Tiel decidis la estraro de TEJO sekve al kongresinvito de Junularo Esperantista Brita (JEB) kaj de la loka junularo-studentaro de Edinburgh.

Edinburgh, situanta en ĉarma, montetoriĉa regiono, apartenas laŭ riĉeco de arkitekturaj monumentoj al la plej belaj urboj de Eŭropo, kaj ĝi ofte estas nomata "norda Ateno". Por la 27-a IJK oni antaŭvidas tute novan, pli modernan skemon de la kongresa programo, kiu baldaŭ estos anoncita. La TEJO-kongreso okazos tuj post la 56-a Universala Kongreso de Esperanto en Londono.

INTEGRIĜO EN AŬSTRUJO

Aŭstria Esperanto-Junularo, la aŭstra landa sekcio de TEJO, okazigis sian ĉi-jaran ĉefkunvenon en Graz, la 31-an de oktobro 1970. Okaze de tiu ĉi evento Aŭstria Esperanto-Junularo (AEJ) interkonsentis kun reprezentantoj de Aŭstria Esperanto-Movado (AEM) pri komuna agado por la evoluigo de Esperanto en Aŭstrujo.

Post ampleksaj diskutadoj pri organizaj kaj financaj aferoj AEJ decidis aliĝi kun sia tuta membraro al AEM. La kunordigo okazis tiel, ke ĉia administrado, inkluzive la gazeteldonadon de AEJ, translokiĝos al la centro de AEM en Vieno. AEJ mem finance administros nur tiujn monojn, kiuj estas destinitaj al TE-

JO kaj al ties organo *Kontakto*. Sekve de tiu integriĝo AEM atingis la membronombro de 1 000.

Plie montriĝas, ke el la kvin Esperanto-organizaĵoj funkciantaj en Aŭstrujo du sufiĉe potencaj deklaris sin pretaj iri komunan vojon en la strebado pri disvastigo de la Internacia Lingvo. Nelaste estu atentigitte, ke tiuj ambaŭ kunfanditaj organizaĵoj ampleksas la junajn fortojn, kiuj estas disponeblaj en Aŭstrujo.

El ĉio ĉi rezultiĝas, ke ĉiuj korespondaĵoj pri junularaj aferoj al Aŭstrujo estu ekde nun direktataj al: Aŭstria Esperanto-Junularo, Heinz Kovacic, A-8010 Graz, Grazbachgasse 57, Aŭstrujo; aŭ Aŭstria Esperanto

Instigite de la deklaro de Tyresö la nederlanda sekcio de TEJO mobilizas siajn anojn kaj per surprizatako prenis tankon en posedon dum ekskurso.



56-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Londono, 31.7. - 7.8. 1971

Alta Protektanto: Urbestro de Londono Sir Peter Studd.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

La Alta Protektanto enoficiĝis

La 14-an de novembro 1970 enoficiĝis Sir Peter Studd kiel la 643-a urbestro de Londono. La okazon oni festis per pompa procesio tra la koro de la urbo, kaj tiel oni daŭrigis longan kaj historian tradicion. Dum tiu tre bunta kaj festa okazaĵo la lordurbestro veturis en sesĉevala ceremonia kaleŝo. Sir Peter Studd elektis kiel temon por sia oficojaro "Komunikado", kun la slogano "Vokas Londono". Li klarigis: "Mi deziras diskonigi ideojn kaj pli bonan interkompreniĝon, kaj pri tio vere temas la interhoma komunikado." La urbestro estas la Alta Protektanto de la Universala Kongreso.

"Jen Londono"

Libron pri la sciindaĵoj de Londono oni tradukis en Esperanton speciale por la Universala Kongreso. "Jen

Londono" estas la titolo, kaj ĝi aperos en bone konata serio "Ladybird". La libro estos havebla por la kongresanoj en 1971.

Proksimaj loĝejoj

Jam rezervitaj estas de la loĝiga servo kelkaj studentaj loĝejoj je modera prezo (por unu- aŭ dultaj ĉambroj ĝi varias inter 102 gld. kaj 127 gld. por tuta semajno, inkluzive de matenmanĝo). Ili situas plejparte tre proksime aŭ relative proksime al la kongresejo. Detaloj pri tiuj kaj aliaj loĝejoj aperos en la Dua Bulteno.

Reduktitaj tarifoj por reklamoj

Favoreprezajn reklameblecojn proponas la kongresorganizantoj ankaŭ al Esperanto-eldonejoj, Landaj kaj Fakaj Asocioj k.s. organizaĵoj. Detalaj informoj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la kongreso.

La 'buso ankaŭ sur poŝtkarto

Jen aperis speciala poŝtkarto okaze de la 56-a UK, bildiganta la konatan londonan aŭtobuson laŭ originala desegnaĵo de K.T. Bartošik. Tiamaniere venas al esperantistoj unika ebleco kombini personan korespondaĵon kun utila reklamado de la Universala Kongreso. La prezo de 5 ekzempleroj estas 1,— gld (por Nederlando 1,12 gld) plus la kutimaj sendokostoj. Al pokvanta mendo aplikiĝas 33% rabato. La mendojn administras la Libro servo de UEA.



anto-Movado, A-1010 Wien-Hofburg, Batthyany-
stiege, Aŭstrujo.

SEMINARIO "LINGVO KAJ KULTURO"

Baza artikolo pri komuna aranĝo de TEJO kaj JEFO

Lingvistikaj fenomenoj enkadriĝas en la tuton de la sociaj fenomenoj, sed ene de tiu fenomenaro oni devas rezervi al ili specialan lokon: la lingvo, kiel portanto de la kulturo, efektive ne povas esti konsiderata kiel malpli grava aspekto de la kulturo. Ĝi transigas la kulturon, eble eĉ submetas ĝin al si.

Ĉu do iu lingvo influas kulturan disvolviĝon? Kiel, kiomgrade kaj kiusence interrilatas lingvo kaj kulturo? Kiel grava estas en grupo la elekto de tiu aŭ alia lingvo por la kultura disvolvo de tiu grupo?

En la lumo de la plej ĝisdataj sciencaj teorioj — tiel lingvistikaj kiel sociologiaj — oni provos skizi respon-
don al tiuj problemoj, kiuj konkrete stariĝas ne nur en la sino de la socio ĝenerale, sed ankaŭ ene de mal-
grandaj grupoj kaj organizaĵoj. La teoria studo live-
ros la instrumentojn por pli profunda studo pri kon-
kretaj kazoj, speciale tiuj de la diversaj organizaĵoj
reprezentitaj en la seminario. En ĉiu kazo aperos ver-
ŝajne elementoj, kiuj ne estas defendeblaj science,
sed sole ideologie, kio kondukas nin al disigo de la
ideologia aspekto disde la lingvistika problemo.

La tuto de la laboroj plenumiĝos ĉu en la formo de
enketoj, ĉu pere de enkondukaj referaĵoj fare de spe-
cialistoj (lingvistoj, sociologoj), ĉu en diskutgrupoj.
La plimulto de la laboro estos farita laŭ la lasta ma-
niero; la grupoj estos konsistigitaj ĉu laŭ lingvo (por
la lingvistikaj diskutoj), ĉu laŭ la diversaj celoj de la



reprezentitaj organizaĵoj (por la ideologia aspekto).
La praktikan flankon de la seminario kompletigos vi-
zitoj al internaciaj organizaĵoj.

Fine de la seminario oni komune redaktos dokumen-
ton kun la konkludoj de la seminario. Tiuj konclu-
doj devus helpi ĉiujn koncernatajn organizaĵojn kon-
sciiĝi kaj pli ĝuste pritaksi la ideologiajn kaj politi-
kajn implikojn de la uzado de la diversaj lingvoj kiel
komunikiloj.

Kie kaj kiam?

La seminario "Lingvo kaj Kulturo" okazos de la 5-a
ĝis la 12-a de septembro 1971 en Strasbourg (Fran-
cujo). Ĝin povas partopreni reprezentantoj de junu-
laraj asocioj esperantistaj kaj ne-esperantistaj kaj ĉiuj
interesiĝantaj individuoj. Laborlingvoj de la seminar-
io estos Esperanto, angla kaj franca..

Ĉiujn informojn donas: NEJO-komisiono de TEJO,
Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z, Nederlando.

INTERNACIA SEMAJNFINO DE NEJ

Meze de septembro renkontiĝis membroj de Neder-
landa Esperanta Junularo (NEJ) por la tradicia aŭtu-
na semajnfino. Al la partoprenantoj (ĉirkaŭ 30) oni
prezentis kelkajn mallongajn filmojn el plej diversaj
landoj kun la komuna temo "subpremo de la indivi-
duo fare de la amaso aŭ totalisma sistemo". Tiujn
filmojn oni vaste diskutis la morgaŭan tagon.


Dum la membrokunveno oni preparolis, krom kuti-
maj administraj demandoj, proponon pri nova orga-
niza strukturo de la nederlanda Esperanto-movado.

La semajnfino ĉeestis ankaŭ gejunuloj el Belgujo
kaj F.R. Germanujo.

Aviadilaj karavanoj

Lastatempe anonciĝis kongresvojaĝo de Centra Dana

Unu el la mondfamaj turismaj allogaĵoj de Londono:
kavalerio paradas antaŭ la reĝino.



Esperantista Ligo organizata de Gustav Kühlmann
(Løvetandsvej 31, DK 2700 Brønshøj, Danlando) kaj
tri aviadilaj karavanoj el Munkeno kaj Düsseldorf de
la vojaĝoficejo Alpha (Karlstraße 45, D-8 München
2, F.R. Germanujo). La vojaĝoficejo proponas i.a.
aŭtobusan vojaĝon tra Anglujo kaj Skotlando kaj se-
majnan banrestadon ĉe la suda marbordo.

Junulara Tago 1971


Ankaŭ dum la 56-a prezentos sin TEJO (Tutmonda
Esperantista Junulara Organizo) per aparta aktivado
dum la t.n. Junulara Tago. Apud tradicia oratora
konkurso ĝi organizos publikan kunvenon, ekspozici-
on, komunan lunĉon, manifestacion en la urbo kaj
junularan balon.

La 27-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO oka-
zos en Edinburgo (Skotlando) tuj post la Universala
Kongreso.

Statistiko (25.11.1970)

Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 2, Brazilo 1, Belg-
ujo 2, Britujo 54, Bulgarujo 14, Ĉeĥoslovakio 4,
Danlando 5, Finnlando 10, Francujo 30, F.R. Ger-
manujo 29, Grekujo 2, Hispanujo 8, Hungarujo 7,
Israelo 1, Italujo 12, Japanujo 4, Jugoslavio 10, Ka-
nado 3, Nederlando 22, Norvegujo 2, Nov-Zelando
1, Pollando 6, Portugalujo 2, Svedujo 13, Svisujo 2,
U.A.R. 2, Usono 9.

Entute 260 aliĝintoj el 29 landoj.



ESPERANTO EN RADIO



Dekstre: Trefleo Mercier,
redaktoro de la programo de
stacio CHLT en Sherbrooke, Kanado,
kiu elsendas en la franca, angla,
hispana kaj Esperanto, ĉiu-
dimanĉe.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1970, Unua Parto, p. 488. Mallongigoj: I = Informoj; P = parolado; K = Kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtokesto 46, Warszawa, Pollando.

15.30-16.00 Warszawa, 31 m, 25 m, 19 m.

Dimanĉe

11.00-11.30 Pekino, 47.69 m (6290 kcs), 40 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.

11.00-12.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento, Sorocaba (São Paulo), Brazilo.

11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.

12.30-13.00 Pekino, 25.12 m (11945 kcs), 19.89 m (15080 kcs). I.

18.00-19.00 Sherbrooke, 102.7 Mcs (mod. frekv.).

I. Le Globe Trotter, Radiostacio CHLT, 3330 ouest rue King, Sherbrooke (Québec), Kanado. (Kvarlingva programo pri turismo.)

20.00-20.20 Roma, 50.08 m (5990 kcs), 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, I-00100 Roma, Italujo.

20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.

22.45-23.00 Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I.K.

12.15-12.25 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (d-ro A. Baur), Svisa Radio, S.O.C., CH-3000 Bern 16, Svislando.

18.15-18.30 Stoke-on-Trent, 94.9 Mcs (mod. frekv.). K.I. Radio Stoke, Cheapside, Hanley, Stoke-on-Trent (Staffs.), Britujo. (Kelkaj programoj en la angla.)

Merkrede

12.15-12.25 Bern, kiel lunde. (s-ro C. Gacond.)

13.45-14.00 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo. (Ĉiun alternan merkredon.)

23.05-23.30 Bilbao, 212 m (1412 kcs). I.P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Bilbao, Hispanujo.

Ĵaŭde

21.45-21.55 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.28 m (9590 kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.28 m (11865 kcs), 19.60 m (15305 kcs). P. (d-ro Baur.)

23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1163 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavio.

Vendrede

18.30-19.00 Clermont-Ferrand, 90.4 (mod. frekv.). K. Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergovia, F-63-Clermont-Ferrand, Francujo.

Jam "unueca" Eŭropo?

"Oni povas demandi, ĉu interne de Eŭropo pluraj regionaj kulturoj ankoraŭ rajtas ekzisti. Tio ne estas retorika demando. Oni renkontas sufiĉe da homoj, kiuj diras: la moderna arto, precipe pentroarto kaj muziko, arkitekturo, la tuta populara kulturo, preskaŭ ne plu montras naciajn trajtojn. Ni do ĉesu, ĉiu por si, prizorgi la propran kulturan ĝardenon kaj ni laboru por unu sola eŭropa kulturo!

Ne estas hazarde, ke oni aŭdas ĉi tiun argumenton preskaŭ ekskluzive en Nederlando. Ĝi ja neas la grandan signifon de la parola kaj skriba lingvo kiel bazo de kultura unuo. Kaj bedaŭrinde estas fakto jam ne pruvenda, ke nederlandanoj ĝenerale restas indiferentaj pri sia gepatra lingvo.

Kontraŭe tuj aperas la nerefutebla fakto, ke neni alia eŭropa ŝtato, certe neni el la pli grandaj, estas preta oferi sian kulturan identecon al iu eŭropa supera kulturo aŭ supera lingvo. Kaj se la grandaj ne estas pretaj, kial ni estas pretaj fari tion?"

El *Nieuwe Rotterdamse Courant*, 13 julio 1970

LASTE APERIS . . .

20.00-20.30 Pekino, 48 m, 45 m, 42 m, 38 m.
21.40-22.00 Tallinn, 290 m (1034 kcs), 49.30 m (6085 kcs). I. Radio Eesti, Esperanto, pk. 402, Tallinn (Estona S.S.R.), Sovetunio. (Nur la antaŭlastan vendredon de ĉiu monato.)
23.40-23.50 Gdańsk, 1322 m (227 kcs), 278 m (1079 kcs), 230 m (1304 kcs). P. Pola Radio, Esperanto-fako, ul. Uphagena 1, Gdańsk Wrzeszcz, Pollando. (Ĉiun alternan vendredon.)

Sabate

11.00-11.30 Pekin, kiel dimanĉe.
12.30-12.40 Gdańsk, 49 m, 48 m, 41 m, 31 m, 19 m kaj 66.29 Mcs (mod. frekv.). Ripeto de la vendreda programo.
12.30-13.00 Pekin, kiel dimanĉe.
14.30-14.40 Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Córdoba 1331, Rosario (Santa Fé), Argentino.
20.00-20.30 Pekin, kiel vendrede.
21.45-21.55 Bern, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).

RADIO BRATISLAVA dissendas kurson per ondoj 68.72 Mcs (mod. frekv.) lunde de 9.45 ĝis 10.00, vendrede de 9.45 ĝis 10.00 kaj de 16.15 ĝis 16.30, sabate de 7.30 ĝis 7.45. La lecionoj elsendataj vendrede kaj sabate estas ripetoj de la lundaj. Nur loke aŭdeblaj.

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncitan ĉiutagan programon prezentas "Anguleton por Esperantistoj" dum la jenaj nacilingvaj programoj: — dana dimanĉe inter 15.30 kaj 16.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 48.90 m (6135 kcs); — germana ĉiutage escepte de dimanĉe inter 12.00 kaj 12.30 per ondoj 200 m (1502 kcs), 49 m, 41 m, 25 m; — sveda marde inter 16.00 kaj 16.30, 18.00 kaj 18.30, 21.00 kaj 21.30 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs).

La anguletoj en la germanaj elsendoj estas 8-minutaj; la anguletoj en la svedaj kaj danaj elsendoj estas 3-minutaj. Ili estas aŭdigataj ĉe la fino de la koncerta duonhora elsendo.

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urbo): Clermont-Ferrand, Gdańsk (M.F.), Muritiba, Rosario, Sherbrooke, Stoke-on-Trent, Sorocaba, Valencia;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj ĉirkaŭmediteraneaj landoj: Bern (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Bilbao (aŭdebla en sudokcidenta Eŭropo), Gdańsk (escepte de 66.29 Mcs), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Roma, Sofia, Tallinn, Warszawa, Wien (aŭdebla en centra Eŭropo), Zagreb;

c) stacio aŭdebla en Azio: Pekino (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT);

ĉ) stacio aŭdebla en Afriko: Bern (31.28 m, 25.60 m, 25.28 m, 19.60 m, 19.44 m, 16.86 m, 13.94 m).

Tio estas nur ĝenerala skizo, variigebla laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera kondiĉo, lokaj kondiĉoj diversspecaj.

NOTO: La stacioj Bern, Pekino, Roma, Warszawa regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.



La kovrilo de la nova disko el Brazilo portas portretojn de la ĝekantistoj kaj de la tradukinto de la kantoj.

unuavice la ĉi-supre bildigita disko longe-daŭra, sur kiu la Esperanto-poeto Sylla Chaves kun tri konataj brazilaj ĝekantistoj kaj unu el la plej bonaj orkestroj de la lando registris kantojn kaj poemojn el la jam anoncita libro *Por pli bona mondo*. Daŭro: ĉ. 32 minutoj. En pli modesta formo eldonis sian poezion la konata Hajkista Klubo en Oosaka, sub titolo *Kapriĉo '70*. En la 52-paĝa libreto ni retrovas i.a. la nomojn de Miyamoto masao kaj Ueyamamasao. Kiel postrikolto de la kongressezono atingis nin kelkaj broŝuretoj modestaspektaj, sed atentindaj por la interesitoj: *Kolekto de kvin artikoloj okaze de la Beethoven-memor-jaro 1970 en Wien* (Karl Beckmann), *Jan Amos Komenský, pioniro de internacia lingvo* (Walter Hube) kaj *La aŭtomata kuplilo, fervoj-teknika studo de la preskaŭ samnoma Walter Huber*. Faka kaj instrua estas ankaŭ *La linindustrio en Belgujo* (15 p.). Okaze de la Lenin-jaro aperis *Centa datreveno de la naskiĝo de Vladimir Iljiĉ Lenin, Tezoj de Centra Komitato de Komunista Partio de Soveta Unio*, 39 p.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 12% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendkosto.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 441, 1 decembro 1970

TELEFONNUMERO DE LA CENTRA OFICEJO

Ekde la 21-a de decembro 1970, la telefonnumero de la Centra Oficejo de UEA ŝanĝiĝis al: (010) 36 15 39.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de marto neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Francujo: Leo Lentaigne, Balaruc-les-Bains(FD). **Japanujo:** Kimiharu Kimura, Sapporo. **Jugoslavio:** Živorad Jevtič, Kragujevac. **Kolombio:** L.-H. Ortigón-Espinel, Bogotá (FD). **Pollando:** Longin Pobiega, Kielce. **Sovet-Unio:** Ants Pruler, Tõrva (VD, FD).

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1970)

Ĉeĥoslovakio: Praha (FD radiodisaŭdigo, teatro, geografio). **Francujo:** Paris (FD Politiko). **F.R. Germanujo:** Merken (JD). **Usono:** Redwood City (FD medicino).

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Suermann, s-ro J., Bonn, F.R. Germanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

4 Behncken, s-ro O.H., Aŭstralio. 5 Bernard, s-ro R.; 6 Kreibig, s-ro J., Francujo. 7 Bily, s-ro H.; 8 Fritsch, d-ro E.; 9 Grundhoff, s-ro J.; 10 Gründler, s-ro M.; 11 Schumacher, f-ino M.; 12 Simon, s-ro K.; 13 Wehrheim, d-ro H., F.R. Germanujo. 14 Henderson, s-ino D.; 15 Maier-Bevel, s-ino A.L.; 16 White, s-ro J.C., Kanado. 17 Rousseau, s-ro H., Kongo. 18 Blomme, f-ino W.B.P.; 19 van Dijk, s-ro J.P.; 20 Ponti, s-ro D.M., Nederlando. 21 Armanis, s-ro A.; 22 Maarli, s-ro E., Norvegujo. 23 Allan, s-ro J.T.; 24 Langman, s-ro D.J., Nov-Zelando. 25 Almén, s-ro H.; 26 Carlsson, s-ro S.H.; 27 Ellard, s-ro D.; 28 Fejde, f-ino G.; 29 Fejde, s-ro M.; 30 Gustafsson, s-ro K.; 31 Johansson, f-ino E.; 32 Johansson, s-ro E.; 33 Lindberg, s-ino B.; 34 Lokna, s-ro J.; 35 Moberg, s-ro K.J.; 36 Näsholm, s-ro Å.; 37 Wedholm, s-ino A., Svedujo. 38 Grutter, s-ino L., Svislando.

DONACOJ (gld.)

Fondaĵo Canuto: Svedujo: s-ro S. Möllestad, 6,96.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: F.R. Germanujo: s-ro M. Murath, 43,50.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Nederlando: N.N., 100,—.

Ĝenerala kaso: Nederlando: s-ro E. Burg, 2,50. Nov-Zelando: s-ro M. McNamara, 80,—.

Patrono A de TEJO: 1 s-ro D.J. Langman, Nov-Zelando. 2 s-ro E.L.M. Wensing, Nederlando.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

IMPOSTOJ

En kazoj de heredaĵoj el kelkaj aliaj landoj, UEA spertis, ke ekzistas landoj, en kiuj la sistemo estas simila al tiu en Nederlando.

Mi havigis al mi informojn el kelkaj landoj, kaj tiujn informojn vi trovos sube.

Antaŭ ĉio estu klare, ke enloĝanto de Nederlando aŭ unuiĝo kun nederlanda jura personeco kun sidejo en Nederlando (kiel UEA), se li aŭ ĝi heredas de enloĝanto de alia lando, ne bezonas pagi heredimpostojn al la nederlanda ŝtato. Tiurilate ekzistas nur unu escepto, nome se temas pri nemoveblaĵo en Nederlando. Sen tiu maloftega escepto, oni povas diri, ke, se heredimposto estas ŝuldata, ĝi estas ŝuldata al la ŝtato, en kiu la mortinto loĝis.

De kiam mi estas estrarano pri financoj de UEA, okazis kelkfoje, ke oni demandis min, ĉu UEA devas pagi grandan imposton, se oni heredigas al ĝi parton de siaj posedaĵoj.

Estas konata fakto, ke en preskaŭ ĉiuj landoj la ŝtato prenas konsiderindan sumon de ĉiu, kiu ricevas iom grandan heredaĵon. Tiu pago al la ŝtato ofte estas ne tiel alta, se temas pri heredo de gepatroj, sed ege alta se temas pri heredo de fora parenco aŭ de mortinto, kiu tute ne estis parenca.

Oni do povus supozi, ke UEA devas pagi multe, se ĝi heredas de iu ajn (aŭ ricevas grandan donacon, ĉar la impostpostulo de la ŝtato rilate al donacoj estas ĝenerale grandparte sama kiel tiu de heredaĵoj). Sed tamen ne estas tiel, almenaŭ ne se UEA heredas de enloĝanto de Nederlando. La nederlanda leĝo pri heredimpostoj diras, ke "se heredas jura persono, kun sidejo en la regno kaj kiu ekskluzive aŭ preskaŭ ekskluzive celas ĝeneralan socian intereson, ĝi ŝuldas 10 procentojn de la valoro de la akiro".

UEA havas nederlandan juran personecon, havas sidejon en la "regno" (= Nederlando) kaj ĝi estas agnoskita kiel organizaĵo, kiu celas nur ĝeneralan socian intereson.

En alia artikolo estas dirite, ke, se jura persono, kiel supre menciite, heredas malpli ol 10 000 gld., ĝi tute ne pagas heredimpostojn. Do en kazo de heredo de enloĝanto de Nederlando, UEA pagas nenion, se temas pri sumo aŭ valoro de malpli ol 10 000 gld., kaj, se temas pri pli alta sumo aŭ valoro ol 10 000 gld., ĝi pagas 10% de la sumo aŭ valoro, kiom ĝi superas 10 000 gld.

NOVJARA BONDEZIRO

En la nomo de la Estraro kaj en mia propra mi tutkore deziras al ĉiuj niaj landaj, fakaj kaj lokaj organizaĵoj, al la kolegoj en la Komitato kaj al ĉiuj ĉefdelegitoj, perantoj, delegitoj, komisiitoj, geoficistoj kaj aliaj funkciuloj sukcesplenan laboron por la Internacia Lingvo en 1971.

Al la tuta membraro, kaj ankaŭ al la uzantoj de Esperanto ekster UEA, multe da prospero kaj persona feliĉo!

Prof. d-ro Ivo Lapenna, Prezidanto

PRI HEREDAĴOJ

Mi akiris ĝis nun informojn el jenaj landoj: Belgujo, Danlando, Britujo, Germanujo, Italujo, Svedujo kaj Usono.

Belgujo. Ankaŭ la belga leĝo konas favorajn kondiĉojn por iaj juraj organismoj aŭ institucioj, kiuj senprofite alstrebas scienckarakteran celon, sed necesas, ke la sidejo estu en Belgujo. Ili pagas 6%. Por UEA, kies sidejo ne estas en Belgujo, tio do ne donas avantaĝon.

La nura avantaĝo estas, ke en tiu lando la tarifo ne estas ege alta. En kazo de heredo ĝis 25 000 gld. (350 000 belg. fr.) ĝi limiĝas al 20%.

Danlando. En tiu ĉi lando la heredimposto por eklezioj, societoj, asocioj ktp. estas ĉiam 30%; ĝi estas sendependa de la alteco de sumo aŭ valoro de la heredaĵo. Sed societoj kaj asocioj, kies celoj estas ĝenerale bonfaraj aŭ ĝenerale utilaj aŭ similaj, povas post petskribo akiri redukton de la hereda imposto al 10% de la heredaĵo.

Oni rajtas supozi, ke UEA post petskribo ricevos la favoron de tiu redukto. En tiu kazo en Danlando la impostpago estas por UEA preskaŭ sama favora kiel en Nederlando.

Britujo. En Granda Britujo (Anglujo kaj Skotlando) la sistemo de heredimposto malsamas al tiu en aliaj landoj. Ĉi tie la imposton oni ne kalkulas surbaze de tio, kion ĉiu aparta heredanto ricevas, sed de la alteco de la tuta heredaĵo. Do, ĉu unu persono heredas 100 000 britajn pundojn, ĉu 10 personoj kune heredas tiun sumon, la pago al la ŝtato estas sama. Avantaĝo estas, ke, se iu postlasas malpli ol 10 000 br. pundojn (= proks. 86 000 gld.), neniuj impostoj estas pagenda. Se la valoro de la postlasitaj objektoj kune kun la mono estas pli ol 10 000 br. pundoj, oni pagas 25% de la plia valoro ĝis 17 500 br. pundoj, 30% de la plia valoro ĝis 30 000 br. pundoj, ktp.

Specialaj avantaĝoj por unuiĝoj, kia estas UEA, ne ekzistas. Laŭ informoj, kiujn mi akiris, britaj testamentantoj kutimas liberigi la testamentajn donacojn de la pago de heredimposto, tiel ke la aliaj heredantoj devas pagi la heredimpostojn. Ekzemple, se iu postlasus 30 000 br. pundojn, la impostpago estus 5 625 br. p., kaj se li testamentus la duonon al UEA, liberigitan de heredimposto, kaj la alian duonon al foraj parencoj, UEA ricevus 15 000 br. p. kaj la parencoj 9 375 br. p. Se li en sia testamento nenion

indikus pri imposto, UEA ricevus 12 187,50 br. p. kaj same la aliaj.

Germanujo (F.R.G.). Bedaŭrinde la heredimposta leĝo en Germanujo estas sama kiel tiu en Belgujo. Laŭ ĝi iaj asocioj, unuiĝoj kaj institucioj kun komunutileco estas favorataj. Se ili heredas, ili estas liberigitaj de pago de heredimpostoj. Do, ekzemple Germana Esperanto-Asocio povas ĝui tiun favoron. Ne UEA, ĉar la leĝo donas la favoron nur al "enlandaj" asocioj ktp. Se UEA heredus en Germanujo sumon (valoron) ĝis 40 000 gld. (= 40 000 germanaj markoj), ĝi pagus 20%.

Italujo. En tiu ĉi lando la italaj "moralaj" instancoj (juraj personoj laŭleĝe rekonitaj) ne pagas la normalajn impostojn pri heredaĵo aŭ donaco, kondiĉe, ke la postlasaĵo aŭ donaco estas por celo de bonfarado, instruado aŭ edukado. Tiu favoro validas por italaj institucioj kaj ankaŭ por fremdaj institucioj, kies sidejo estas en Italujo aŭ en eksterlando, "se inter la koncerna ŝtato kaj la itala ŝtato ekzistas interkonsenta konvencio pri reciproka traktado tiurilate". Bedaŭrinde, ĝis nun ne ekzistas tia konvencio inter Italujo kaj Nederlando. Pri la alteco de la italaj heredimpostoj mi ĝis nun ne havas informojn.

Svedujo. Ankaŭ en Svedujo la heredimposta leĝo ne estas favora al UEA. Fakte la reguloj estas kiel en Germanujo (F.R.G.). Liberigitaj estas nur svedaj unuiĝoj, asocioj, institucioj. La leĝo eĉ enhavas la vortojn "impostliberiĝo ne koncernas eksterlandan akademion, fondaĵon aŭ asocion". Krome la tarifo en Svedujo estas ege alta, ekzemple ĉe heredo de

1 000 sv. kr.	200 sv. kr.
5 000 "	1 000 "
10 000 "	2 500 "
20 000 "	6 500 " ktp.

Do en kazo de heredo de 20 000 sv. kr. (proks. 15 000 gld.) oni jam pagas 32½%.

Usono. Ĉiu el la kvindek ŝtatoj de Usono havas sian leĝon pri heredimpostoj. Feliĉe ĉiuj estas preskaŭ egalaj, nur la ŝtato Louisiana havas alian leĝon, bazitan sur la franca modelo (Kodo Napoleona). Do la 49 ŝtatoj havas leĝon, rilate al impostoj, bazitan sur la angla sistemo. Tio signifas, ke la pagota heredimposto estas kalkulita de la tuta heredaĵo. Sed, por kalkulo de la valoro de la tuta heredaĵo estas subtrahita i.a. la sumo "al aŭ por la uzo de iu korporacio organizita por kaj funkciigata ekskluzive por religiaj, bonfaraj, sciencaj, literaturaj aŭ klerigaj celoj". Al tio aldoniĝas frazparto, kiu nuligas la eblecon de subtraho, se la heredaĵo aŭ parto de ĝi iras al privata persono aŭ akciulo aŭ estas uzata por "influi leĝfaradon".

La konkludo estas, ke en Usono la heredimpostaj leĝoj estas tre favoraj por UEA, ĉar imposto ne estas pagata por la parto de la heredaĵo destinita al ĝi.

La supra trarigardo estas farita laŭ la informoj, kiujn mi ricevis el diversaj landoj. Se iu el la legantoj havas rimarkojn, li bonvolu skribi al mi. Krome mi petas la legantojn, kiuj konas la leĝojn en landoj, pri kiuj ĝis nun mankas informoj, skribi al mi, por ke post kelka tempo mi povu publikigi ankaŭ ilin.

E.J. Woessink, estrarano
pri financoj kaj administrado



ANON- CETOJ

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.



Tutmonde korespondi deziras gejetnamoj:
s-ino Thai-Thi-Kieu-Nga, 15 Thông Nhất, Saigon, kaj s-ro Đào-Quang-Huỳnh, 358/7 H₁, Lê văn Duyệt, Saigon.

Poŝtkartvespero okazos je la 15-a de marto 1971 (25 gelernant-klubanoj). Sendu bildkartojn. Ni respondos. Esperanto-klubo de Kuopio "Lingvoponto", pf. 119, Kuopio, Finnlando.

En 1971 Gotenburgo celebros sian 350-jaran jubileon. Grandiozaj aranĝoj okazos. I.a. mi intencas ekspozicii Esperanto-filatelion. Urĝa peto! Kunhelpu imponigi la ekspoziciaĵon, sendante belafankitan poŝtaĵon el la tuta mondo al: s-ro E. Schuldenfrei, Avenyn 11-13 G 1., S-411 36 Göteborg, Svedujo.

Kolektisto-riparisto de muzikskatoloj serĉas malnovajn specimenojn kaj dokumentojn, ankaŭ fotojn kaj magnetajn registraĵojn por nunredaktata verkaĵo. Skribu al inĝeniero Blyelle, 11, bd Pont-d'Arve, CH-1205 Genève.

Kiu amiko povus ludoni Esperantofilmojn Super-8? Esperantogrupo "STELO", poŝtfako 10, CH-1211 Genève-Rive. (Monatkunvenoj tria ĵaŭdo.)

Kie estas Esperantujo? Tie, kie oni parolas Esperanton. Tie, kie flirtas la verda flago. Esperantujo vi trovos apud Blua Maro; kie brilas la plej bela suno de Eŭropo; kie floras la migdalarboj; kie la mimozoj spegulas la sunbrilon. *Venu al Esperantujo!* Vian manĝaĵon vi povos prepari laŭ via nacia maniero. Sed venu antaŭ la 30-a de junio, poste komenciĝos la invado de la turistoj kaj ili troplenigos Esperantujo. Skribu al Helene Stoffers, Villa "Tabou", Supercassis 47, F-13-Cassis, Francujo.

Tutmonda korespondado (Esperante, france, angle). Sendu foton, aĝon, konatajn lingvojn. Revuo kun centoj da adresoj kaj fotoj. Mondklubo "Paris 2000", B.P. 379, Paris (R.P.), Francujo.

35-jara fraŭlo deziras korespondi kun gesamideanoj en diversaj landoj, escepte Ĉeĥoslovakio kaj Bulgario. Miaj ŝatokupoj estas folkloro kaj muziko, kaj eventuale mi volonte interŝanĝos librojn aŭ ankaŭ bildkartojn pri brodaĵoj. Vi povas skribi al Kasper Frans, Willemstraat 44, Groningen 6, Nederlando.

Mi deziras interŝanĝi aŭ aĉeti ŝakpecarojn de la tuta mondo. J.D. Goulding, Retriever Lodge, Tudor Close, Seaford, Sussex, Britujo.

Bonega apudmara gastdomo estas "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo, 70 kilometroj de Dovro. Intencantaj longrestantaj en Britujo kongresanoj skribu por detaloj.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, Kopenhago 2700 Brh., daŭre akceptos ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikiĝo de UEA.

Bonvenigu la invadiston! Sendu unu respondkupono por "Kyakeroj kaj la homa familio". Ankaŭ du aliaj legindaĵoj. A.J. Leather, 19 Birch Drive, Silverdale, Carnforth, Lancs., Anglujo.

Brasília, ĉefurbo de Brazilo, invitas vin al korespondado. Gelernantoj de diversaj gradoj, aĝoj, profesioj kaj intereso. Adreso: Grupo Espírita Fraternidade, Av. W5 Sul, Q. 909, módulo 29, Brasília, Brazilo.

Mi deziras korespondi, ev. sonbende. Ĉeftemo: La amo de Dio = la miraklo de Kosmo. Harald Andersson, laboristo, Blurv. 5, S-712 00 Hällefors, Svedujo.

Gekorespondantoj, Bondezirojn por 1971 de S-ro James (Jim) Gow, Anglujo.

Mi aĉetus usonan revuon "Machinery" (marto, 1965) kaj librojn, revuojn k.s. pri aŭtodampiloj en la lingvoj angla, franca, germana, hispana, rusa. Nino Vessella, via Panniglia, 54, I-03030 Roccasecca, Italujo.

Ludkartoj. Kolektanto volas interŝanĝi neordinarajn ludkartojn. Oni bezonas kartojn kun italaj, hispanaj, francaj, svisaj kaj germanaj emblemoj, ktp. Ankaŭ tarokoj, kaj ludkartoj el Sovetunio kaj orienteŭropaj landoj. Skribu unue, kun plena priskribo, al George Beal, 18 Elmscott Gardens, Londono N21 2BP, Anglujo.

Adresoŝanĝo ekde 1.10.1970: S-ro Eriko Sunardo, Gang Mandor VII no. 7, Djakarta, Indonezio.

Finna s-ino deziras kontakton kun eksterlanda samideano por akiri praktikon de Esperanto. Se vi parolas bone Esperanton kaj povas pasigi kelkajn semajnojn en mia hejmo, bonvolu skribi tuj al s-ino Margareta Kostainen, Siltakatu 1 A 13, Heinola, Finnlando.

200 000 poŝtmarkojn amasvaro (50 div.) mi interŝanĝas. Minimum-proponoj 10 000. Mi aĉetas kompletajn uzitajn eldonojn de orientaj landoj laŭ miaj aĉetlistoj. Vendo kaj aĉeto de Esperanto-poŝtmarkoj kaj stampoj. Glumarkoj diversspecaj, 500 ekz. 2 dol. A. Neussner, Berlin 62, Dominicusstr. 40, Germanujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Port Credit, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkupono, kompletan liston de siaj programoj.

ATENTU!

ANTAŬ AŬ POST LA LONDONA KONGRESO

VIZITU KEIGHLEY-n,

*la naskiĝ-lokon de la Brita Esperanta movado kaj
mond-faman Brontë-an Distrikton.*

**LA KEIGHLEY-A ESPERANTA SOCIETO
BONVENIGOS VIN!**

Por broŝuro skribu al: Town Clerk,
Town Hall,
Keighley,
Yorkshire,
Britujo

PARAPSIKOLOGIISTOJ

esperantistoj, kiuj ŝatas kolektiĝi ideo,
estas petataj tuj skribi al s-ro

Prof-o Corrado Cerri-Calzoni
Casella postale 159
I-13051 Biella, Italujo

Ni solvis la problemon



kiel teni en bona ordo viajn ekzemplerojn de "Esperanto". Tiu ĉi bela bindilo permesas al vi aldoni en nuraj sekundoj ĉiun novan numeron de la revuo tuj post ĝia apero. Jam de la unuaj numeroj vi do havas pretan kolekton. Simpla sed efika sistemo certigas, ke la paĝoj kuŝas ebenaj por facila legado ĝis la meza rando. La bindilo konsistas el fortika kartono tegita per bonkvalita tolo, kun surprisitaj titoloj kaj surglueblaj jar-ciferoj. Mendu nun: nur 5,— gld.! (Oni ne pagas sendokostojn.)

SINTAKSO! Jen la ŝlosilo
por regi la lingvon.

PERFEKTIGA KURSO
Plena Traktato pri la Sintakso

dediĉita al tiuj, kiuj
deziras koni ĝisfunde,
paroli korekte kaj
skribi perfekte
ĉies lingvon.

200 paĝoj, 15 x 22 cm.
Prezo: 5 usonaj dolaroj
(Pago al Buenos Aires)

Daniel Quarello
C.C. 47, Suc. 13, B.
Bajreso, BUENOS AIRES
(Argentino)

KULTURAJ ARANĜOJ 1971

En turisma franca regiono "Val de Loire"
Ideala feriejo por familioj aŭ izoluloj tutmondaj
Agrabla kastelo, parko, banejo, lud-terenoj, sana nutrado

La ESPERANTISTA KULTURDOMO

(Fondinto: H. Micard)

Kastelo GRÉSILLON

F-49-BAUGÉ, Francujo

PASKAJ FERIOJ

1-a semajno: 4-9 aprilo

Deka kultura semajno organizita de UFE.

Studo de tekstoj — Kursoj — Aplikado de la lingvo
— Ekskurso

2-a semajno: 9-16 aprilo

STUDSEMAJNO

Kursoj — Aplikado de la lingvo — Diversaj distraĵoj

DUM LA SOMERO

Unua periodo — 4-25 julio

KULTURAJ ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ

Diversgradaj kursoj — Ekzamenoj — Vesperaj distraĵoj — Bindado de libroj — Korbofarado — Emajlado — Ekskursoj

Dua periodo — 25 julio - 7 aŭgusto

KULTURAJ kaj TURISMAJ FERIOJ

Prelegoj — Gvidataj konversacioj — Distraĵoj — Ekskursoj

Tria periodo — 7-14 aŭgusto

POSTKONGRESO de SAT

La programo estos preta en januaro

Kvara periodo — 15 aŭgusto - 4 septembro


STUDSEMAJNOJ kun programo simila al tiu da la 1-a periodo. Diversaj eblaj ekskursoj al la kasteloj de la Loire kaj al urboj: Angers, Nantes, Le Mans, La Flèche, Le Lude.

Informoj kaj aliĝoj: Kastelo Grésillon, F-49-Baugé, Francujo.

Se vi vere ne scias

kion donaci ĉi-jare,
pensu pri Donaca Karto
de la Libroservo de UEA.

Vi pagas 5,- guldenojn
(aŭ egalvaloron), plus
la sendokostoj, kaj
ricevas specialan
karton, kiun vi plu-
sendas — kun viaj
varmaj bondeziroj,
kompreneble —
al tiu problema
persono. Ŝi (aŭ
li) povos tiam
aĉeti laŭ propra
elekto kiun ajn
libron aŭ diskon
aŭ abonon ĉe la
Libroservo de UEA.



LIBROSERVO DE UEA
NIEUWE BINNENWEG 176
ROTTERDAM - 3002
NEDERLANDO